

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**FAME
premiegas**

**Lingvoj
ĉe UN**

**Esperanto
inter
rifuĝintoj**

UK 1996: la horo de Prago

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA:
Kun fiero kaj unuigita forto (LEE Chong-Yeong)
- 2 Nia kongreslando: De Jan Hus ĝis Václav Havel (Miroslav Malovec);
Mezepoko konservita en moderno (Stanjo Chrdlová); Ni en Prago
(Eli Urbanová); Ses jarojn post la revolucio (Petro Chrdle);
Fondaĵo Karolo Piĉ establita; Kion legi antaŭ Prago?
- 7 Recenzoj: *Milito kontraŭ salamandroj, Ne nur soldato Ŝvejk*
(KURISU Kei); *Lumo en tenebroj* (Jesper Lykke Jacobsen);
Hetajro dancas (István Ertl)
- 8 Defende al du vortaroj (Ionel Oneț, J. Le Puil/J-P. Danvy)
- 9 Kulturo: Subvencioj laŭ severaj kriterioj (intervjuo kun Stefan Maul);
Scienca premio de FAME
- 10 Lingvopolitiko: Pri la lingva reĝimo de UN (Detlev Blanke);
Rezolucio por multlingveco; Lingvoproblemo estas bombo;
Informkampanjo ĉe EP-anoj (Germain Pirlot)
- 12 Azio: Lanterno por la mondo; Religiestro por Esperanto (CHOE Tae-sok)
- 13 Afriko: Esperanto inter rifuĝintoj (NZANIYE Jessé Le-Prince);
Por konvinka bildo Triamonde (Eugène Raveloson)
- 14 Eŭropo: Malferma jubileeto; Toleremo en tri lingvoj
(Gerrit Berveling, Hektor Alos)
- 15 Laste aperis
- 16 Forumo: Kie estas nia kvalito? (WANG Tianyi); Ŝanco kaj alternativo
(Werner Schäd); Komerca pensado (Paola Gozzi Gorini)
- 17 Instruado: Mazi superis ĉian optimismon (intervjuo kun R. Dobrzyński)
- 18 Lingvo: El sub la tapiŝo (Bernard Golden)
Loke – Fake
- 19 Anoncetoj
- 20 Nekrologo: Irja Klemola (1898-1995); Oficiala informilo

Vi trovos,

post la novjara saluto de prezidanto Lee, paĝaron kiu ĉiĉeronas vin en la kongreslando Ĉeĥio, precipe tra ties historio kaj kulturo (p.2-6). Eĉ la recenza rubriko (p.7-8) traktas nur librojn el Ĉeĥio. Jen, vi diros, *Esperanto Ĉeĥ-metode* provas logi kongresanojn al la UK en Prago! Vi pravas: ni invitas vin aliĝi al tiuj 700 esperantistoj kiuj ĝis la mezo de decembro jam anoncis sian intencon partopreni.

Sed, kiel ĉiam, ni klopodis zorgi pri tema diverseco. Ĝin garantias intervjuoj pri Fondaĵo FAME kaj pri la genezo de la populara *Mazi*, tekstoj lingvopolitikaj, raportoj pri landaj kongresoj, opinioj pri Esperanto en la komerco kaj — eĉ — artikolo de Bernard Golden, kiu helpas *kompensi* iun *damaĝon* al la lingva sento de niaj legantoj.

Preskaŭ ne aperas numero de nia revuo sen iu peto helpi novajn, nepagipovajn kaj malfortajn movadarojn. Pensante pri la Internacia Semajno de Amikeco (18-24 februaro), ni memoru ankaŭ tiujn subtenindajn interesatojn kiuj atendas, ekzemple, legomaterialon en kampo de rifuĝintoj en Kenjo (p.13).

La kovrilo: La horloĝego de la malnova Praga urbodomo.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 33; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disko 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario (strategia planado, eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282 [of/h]; ☎+1-613-565-9279 [of/h]; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-5284-1214 [h], +31-50-613769 [of]; ☎+31-50-613763 [of]; ☐azgiow6lfred@relay.nl.net.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-208242 [of]; ☎+370-7-204970 [of].

Estrarano (kongresoj, kulturo, TEJO): s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98 [h]; ☎+39-6-39-72-61-69 [h]; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (faka kaj scienca agado): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Kun fiero kaj unuigita forto

Antaŭ sep jaroj, la tiama prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, enkondukis la novan jaron per nova devizo: DUE. Temis pri la strategiaj prioritatoj de UEA, t.e. disvastigo de Esperanto, utiligo de Esperanto, edukado al tutmonda konscio. Surbaze de la strategio, mi havas la taskon realigi ilin kun la helpo de ĉiuj. La novan jaron ni komencu kun memfida kuraĝo kaj freŝaj ideoj.

Se ni rigardas al la pasinta jaro, ni vidas pruvojn ke UEA jam bone laboras sur la menciitaj kampoj. Per la aliĝo de landaj asocioj el Rumanio kaj Togolando, kaj per la ekfunkcio de internaciaj komisionoj pri la movadoj en Azio kaj Ameriko, nia asocio fariĝis ankoraŭ pli tutmonda. La brila kongreso en Tampere verŝajne enhavis rekordan nombron da kulturaj, fakaj kaj movadaj kunsidoj; mi aparte mencias la sukcesan kunlaboron kun Akademio Internacia de la Sciencoj, kiun UEA daŭrigos ankaŭ ĉi-jare. Ne laste, daŭre restas tre forta kaj konkreta la solidareco inter niaj membroj, montrita interalie per amasa aliĝo al Societo Zamenhof kaj donacado al Konto Espero, Fondaĵo Canuto kaj Fondaĵo Afriko. Mi persone fieras esti ano de tia movado kiu, se ĝi ankoraŭ ne kapablas igi la mondon paca kaj justa, tamen laboras por mildigi militajn kaj ekonomiajn suferojn — kiel ni faris en Bosnio-Hercegovino.

Sed ni ĉiuj scias ankaŭ ke tre granda restas la laboro antaŭ ni, por konvinki la eksteran mondon pri la graveco kaj utileco de Esperanto. Ŝajnas al mi ke precipe al tiu celo necesas direkti plian atenton. Por ĉi tiu jaro, mi vidas tri ĉefajn prioritatojn.

Unue, la plivastigo de Eŭropa Unio kaj la intensigo de tuteŭropa kunlaboro alportas pli kaj pli da atento al diversaj lingvaj problemoj, nelaste en la edukistemo kaj sur la kampo de lingvaj rajtoj. Se iu interregistara organizo oficiale akceptus Esperanton kiel helplingvon, EU verŝajne estus la unua. En tiu senco, Eŭropo estas strategia regiono por nia movado. Mi deziras ke ĉiuj esperantistoj subtenu la klopodojn de la aktivuloj kiuj laboras por gajni la subtenon de eŭropaj

instancoj, interalie por plurlanda eksperimenta instruado de Esperanto kadre de la EU-programo “Sokrates”. Ekzistas jam kelkdeko da deputitoj en Eŭropa Parlamento kiuj principe subtenas Esperanton. Necesas uzi ĉiujn demokratiajn rimedojn por aktivigi ilin kaj kreskigi ilian nombron.



Due, la rilatoj inter UEA kaj kelkaj internaciaj organizoj donas multe da ebloj por praktika kunlaboro. Luj anoj de la nova Estraro jam vizitis Uneskon (kaj Eŭropan Union) por priparoli ties partoprenon en internacia simpozio pri lingvopolitiko, kadre de la ĉi-jara UK en Prago. La invititaj reprezentantoj (ankaŭ el UN kaj aliaj organizoj) povos mem rekte sperti ke Esperanto estas ne plu projekto sed realaĵo. Ni ankaŭ planas konferencon pri la instruado de Esperanto en 1997, kiel eron en la konferenc-serio “Lingua-pax” de Unesko. La aranĝoj omaĝos samtempe du grandajn pionirojn de la batalo por Esperanto: Inazo Nitobe, Asistan Ĝeneralan Sekretarion de Ligo de Nacioj, kiu antaŭ 75 jaroj partoprenis en la 13-a UK en Prago kaj verkis gravan raporton pri siaj spertoj; kaj Edmond Privat, kiu iniciatis la grandiozan Konferencon pri la Instruado de Esperanto en Lernejoj en 1922, sub aŭspicio de la Ligo.

Trie, ekzistas multaj socie influaĵoj homoj kiuj ne parolas Esperanton sed ŝatas la ideon ligitan al la lingvo, t.e.

la strebon al justa kaj paca mondo ankaŭ sur la kampo de komunikado. Ili estas gravaj “amikoj de Esperanto”, kiuj povas esti bona protektmuro de nia movado kaj subtena forto por niaj projektoj. La Estraro nun esploras manierojn gajni kaj utiligi la subtenon de tiu valora amikaro. Mi jam nun invitas la landajn asociojn kunlabori por gajni “amikojn de Esperanto” sialande.

Por sukcesigi tiujn novajn projektojn, aktiva subteno kaj partopreno de niaj membroj estas nepre bezonata. Ni devas agi ekstere, ne nur en Ago-Tago, sed ago-monate, kiel brazilaj aktivuloj jam faris, aŭ eĉ ago-jare. Ni devas ankaŭ aparte kuraĝigi kaj subteni la junularan agadon, speciale por grandigi la nombron de esperantistoj kiuj estonte partoprenos kaj gvidos la movadon. Granda helpo tiurilate povus montriĝi la nova vidbenda kurso *Mazi en Gondolando*, sukcese lanĉita de Internacia Esperanto-Instituto dum la Kongreso en Tampere.

Parolante pri la estonteco, mi volas esprimi ankaŭ elkoran dankon al homo kiu dum la pasintaj 23 jaroj fariĝis preskaŭ kromnomo de UEA. Jam en pasinta aprilo mi eksciis ke Simo Milojević deziras demisii kiel ĝenerala direktoro de UEA fine de la jaro 1995. Feliĉe, li restos labori en la Centra Oficejo, kie ni daŭre profitos de lia akumulita scio, dum la vakan postenon akceptis Osmo Buller, nia tre sperta oficeja direktoro. Mi havas bonan kialon antaŭvidi tre pozitivajn rezultojn de tiuj decidoj, kiuj montras grandan sindediĉon al UEA.

La nova jaro komenciĝas esperplene por nia Asocio, kun unuigita forto de niaj membroj, niaj aktivuloj, niaj oficejoj, niaj estraranoj. Ni uzu tiun forton saĝe. Nia tasko ja estas ne nur disvastigi la lingvon aŭ ĝin uzi por personaj celoj, sed ankaŭ kontribui al la mondaj paco kaj interkompreniĝo laŭ la tradicio de Zamenhof kaj Hodler. Tiu plej alta celo devas inspiri nian agadon. Ni agu kun fiero kaj espero!

Mi deziras feliĉan kaj prosperan novan jaron al ĉiuj niaj membroj kaj samideanoj!

LEE Chong-Yeong

De Jan Hus ĝis Václav

En la arkanojn de la kongreslandaj historio kaj kulturo enkondukas nin tradukisto, vortaristo, redaktoro Miroslav Malovec.

En la 9-a jarcento, kiam la grekaj apostoloj Cirilo kaj Metodo de Tesaloniko kreis slavan alfabeton kaj slavigis la liturgion, ekzistis fakte nur unu slava lingvo kun reciproke kompreneblaj dialektoj. Nur dum la sekvaj jarcentoj la dialektoj memstariĝis.

En la 9-a jarcento formiĝis princlando Granda Moravio (Bohemio, Moravio, Silezio, Slovakio, Panonio) kun ĉefurbo Nitra. Ĝin en 906 detruis invadis hungaroj, kiuj ekloĝis en Panonio, kaj ankaŭ Slovakio restis dum mil jaroj sub ilia potenco. Bohemo, Moravio kaj suda Silezio formis la tri landojn de la "Bohemia krono", unue princa, post 1158 reĝa. Post la ĉeĥa dinastio de Primislidoj (ĝis 1306) regis tie Luksemburgoj (ĝis 1437), mallonge ĉeĥa reĝo, Georgo el Poděbrady, sekvis la litova-pola dinastio Jagelonoj (1471-1526) kaj la aŭstraj Habsburgoj (1526-1918). En 1918 ekestis Ĉeĥoslovakio, kiu en 1993 dividiĝis je Ĉeĥio kaj Slovakio.

Komence de la 15-a jarcento vivis granda kritikanto de la katolika eklezio, Jan Hus, kiu estis ankaŭ reformanto de la ĉeĥa ortografio (literoj *č š ř ž á é í ó ú*). Lia aŭtodafeo dum koncilio en la germana Konstanco (1415) tre korusis kaj incitis la ĉeĥan nacion, liaj ideoj fariĝis kerno de la ĉeĥa reformacio kaj kaŭzis "husanajn militojn" inter la katolikoj kaj protestantoj (ĝis 1434). Protestantismo enradikiĝis en Ĉeĥio, kaj la religiaj konfliktoj kulminis en 1620 en batalo apud Prago, kiam venkis katolikoj. Nekatolikoj devis forlasi la landon, la servuta popolo estis perforte rekatolikigita. Ĉar la klasika ĉeĥa literaturo estis plejparte protestantisma, estis persekutataj ĉeĥaj libroj kaj la ĉeĥa lingvo preskaŭ dronis en la germana. Nur en 1781, kiam imperiestro Jozefo la 2-a eldonis dekretojn pri religia toleremo kaj pri nuligo de servutula senrajteco, povis reviviĝi ankaŭ la ĉeĥa lingvo, kiu ĝis tiam vegetis en vilaĝoj.

Entuziasmuloj lanĉis movadon kiu laŭ multaj trajtoj similas al la Esperanto-movado. En la germanigita Prago parolis la ĉeĥan eble nur dudek personoj, sed jam post kelkaj jardekoj la situacio inversiĝis. Lingvisto Josef Jungmann (1773-1847) riĉigis la ĉeĥan per dekmiloj da vortoj kreitaj el hejmaj fontoj, revivigitaj el la malnova literaturo aŭ adaptitaj el aliaj slavaj lingvoj, kaj helpe de tradukoj el Ŝekspiro kaj Miltono li sukcesis enkonduki ilin en la vivon. La daŭrigintoj de lia laboro sukcesis verŝajne pro tio ke ili ne klopodis propagandi la ĉeĥan en ĝia plej primitiva formo, proponante ĝin kiel facilan komunikilon, sed tute male: ili strebis ke la lingvo servu al sia malgranda nacioto same riĉe kiel la grandaj lingvoj al grandaj nacioj.

La ĉeĥa estas lingvo fleksia, relative malfacila, kun 7 deklinaciaj kazoj. Ĝi havas po 14 paradigmojn por deklinacio kaj por konjugacio. Ankaŭ adjektivoj, pronomoj kaj numeraloj estas deklinaciataj. Ekzistas multaj esceptoj. La ĉeĥa uzas la latinan alfabeton kun supersignoj hoketo (č), streko (ú) kaj cirkleto (ů).



Litomyšl: ĝi estas la naskiĝurbo de la Esperantaj verkistoj Jiří Karen kaj Karolo Pič — sed ankaŭ de la komponisto Bedřich Smetana.

La ĉeĥa kulturo

El la ĉeĥa kulturo la mondo verŝajne plej bone konas la ĉeĥan muzikon. El la granda kvaropo Bedřich Smetana (1824-1884), Antonín Dvořák (1841-1904), Leoš Janáček (1854-1928) kaj Bohuslav Martinů (1890-1959), Smetana estas plej alte aprezata en sia patrujo, sed aliloke en la mondo pli populariĝis Dvořák. La komponistojn famigis iliaj operoj *Vendita fianĉino* (Smetana), *Najado* (Dvořák), *Kata Kabanova* (Janáček) kaj *Grekaj Pasionoj* (Martinů). Al la klasikuloj de la ĉeĥa muziko apartenas ankaŭ Josef Mysliveček (1737-1781), nomata "il divino boemo" ("la dia ĉeĥo"), Zdeněk Fibich (1850-1900), Josef Suk (1874-1935), Josef Bohuslav Foerster (1859-1951) kaj Vítězslav Novák (1870-1949).

Male la ĉeĥaj pentroarto kaj skulptarto ne ĝuas tian famon. Tamen, inter la barokaj artistoj eminentiĝis la pentristoj Karel Škréta (1610-1674), Petr Brandl (1668-1735), Jan Kupecký (1667-1740); gravuristo Václav Hollar (1607-1677), fondinto de la grafika arto en Anglio, kie li longe vivis; kaj skulptistoj Bernard Matyáš Braun (1684-1738) kaj Ferdinand Maxmilián Brokof (1688-1731). Preskaŭ simboloj de la ĉeĥa arto fariĝis en la pasinta jarcento Josef Mánes (1820-1871) kaj Mikoláš Aleš (1852-1913), kun kies populareco nun povas kompari sin sole Josef Lada (1887-1957), genia ilustristo de porinfanaj kaj satiraj verkoj (*Ŝvejk*, *La bapto de caro Vladimiro*), kaj Jan Zrzavý (1890-1977). En la mondo eble estas pli konataj Václav Brožík (1851-1901), aŭtoro de historiaj bildoj, Alfons Mucha (1860-1939), vivinta en Parizo kiel reprezentanto de "Art Nouveau", František Kupka (1871-1957) kaj Josef Šíma (1891-1971), kiuj vivis en eksterlando.

Esperantistojn verŝajne pli interesas la ĉeĥa literaturo. Sur la ĉeĥa teritorio dum jarcentoj kunvivis ĉeĥoj, germanoj kaj judoj. La tri elementojn eble plej klare reprezentas

v Havel



la verkisto **Franz Kafka** (1883-1924), judo kun ĉeĥa nomo verkanta germane en Prago. Mondfamecon atingis liaj romanoj *La kastelo* kaj *La proceso*, filmigitaj en Holivudo. Lia heroo, Jozefo K., renkontiĝas kun la maŝineco de burokratisma reĝimo, por kiu unuopulo estas nur senvalora radeto. Same gloraj estas la germanlingvaj Pragaj verkistoj **Franz Werfel** (1890-1945), **Max Brod** (1884-1968), “la rapidega raportisto” **Egon Erwin Kisch** (1885-1948), kaj la poeto **Rainer Maria Rilke** (1875-1926).

Hašek inventis roboton

El la ĉeĥlingvaj aŭtoroj ĝuas kompareblan popularecon iliaj samtempuloj **Jaroslav Hašek** (1883-1923), kiu en sia satiro *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk* ridindigis militojn, kaj **Karel Čapek** (1890-1938), kies kontraŭmilitaj verkoj *Milito kontraŭ salamandroj*, *La blanka malsano*, *Patrino* avertis en originala formo kontraŭ la danĝero de faŝismo. Lia filozofia teatraĵo *R.U.R.* pri ribelo de artefaritaj laboristoj enkondukis la internacian vorton *roboto* por artefarita homo (el la tutslava *robota*, *rabota* = laboro).

Inter la nuntempaj ĉeĥaj aŭtoroj estas internacie konataj la poetoj **Jaroslav Seifert** (1901-1986) — la sola ĉeĥa Nobel-premiito pri literaturo —, la prozistoj **Milan Kundera** (n. 1929) kaj **Bohumil Hrabal** (n. 1914), kaj la dramverkisto **Václav Havel** (n. 1936), la nuntempa prezidento de Ĉeĥa Respubliko. Milan Kundera vivas en Parizo kaj famiĝis per siaj romanoj *La ŝerco*, *Ridindaj amoj*, *Adiaŭa valso*, *La neeltenebla leĝero de l' ekzistado*. La romanojn kaj rakontojn de Hrabal karakterizas poezieco, vorta ĵonglado kaj eksperimentado (*Brua izoleco*, *Har-tondado*, *Mi priservis la anglan reĝon*). Laŭ lia novelo *Severe observataj trajnoj* reĝisoro Jiří Menzel kreis filmon distingitan per Oskaro. Havel apartenas al la ĉefaj aŭtoroj de la moderna absurda dramo. En la satira dramo *Kompreniĝo* li eĉ kreis arte-

faritan lingvon, *Ptidepe*, per kiu burokratoj maskis siajn senenhavajn parolojn. La teatraĵo ne celas kontraŭi planlingvojn kiel Esperanton, sed rifuzas la artefaritan lingvaĵon de ŝtata burokratismo, florantan ĉefe en totalismaj reĝimoj. En la Praga UK la trupo *Kia Koincido* prezentos *Aŭdienco* de Havel.

Tamen ne eblas paroli pri la ĉeĥa literaturo sen menci la verkojn plej estimatajn en sia patrujo.

Absoluta ĉeĥa poezia ĉefverko estas la romantika poemio *Majo* de **Karel Hynek Mácha** (1810-1836), kiu utiligas la muzikajn kvalitojn de la ĉeĥa lingvo. Preskaŭ netradukebla en aliajn lingvojn, ĝi impresas kiel simfonio el vortoj.

En Esperantujo estas pli famaj aliaj du ĉefverkoj de tiu tempo, dank' al majstra traduko de Tomáš Pumpr, nome *Bukedo* de **Karel Jaromír Erben** (1811-1870), kolekto de baladoj apenaŭ trovantaj komparon en la tuta mondliteraturo, kaj la satiro *La baptado de caro Vladimiro* de **Karel Havlíček-Borovský** (1821-1856), mokanta la ŝtatan potencon kaj ĝian burokratan administracion.

Avineto de **Božena Němcová** (1820-1862) estis la unua granda prozaĵo kiu fariĝis vera simbolo de la ĉeĥa nacia literaturo. La aŭtorino rememoris sian infanaĝon kaj sian edukistaron, avinon, ties popolan saĝon kaj modeston, kiu tiom kontrastas kun la orgojla stulteco de la homoj el la proksima princa kastelo. La stilo de la rakonto estas tiel klara kian la ĉeĥa prozo ĝis tiam ne konis.

Kiel la plej granda stilisto en la ĉeĥa literaturo estas agnoskata **Vladislav Vančura** (1891-1942), precipe pro sia lingva miraklado en la historia romano *Markéta Lazarová* pri konflikto inter du mezepokaj rabistaj bandoj, kaj en la bonhumora rakonto *Kaprica somero*, kies figuroj travivas ŝvitvarman someron ĉe rivero. Sed ĝuste pro vortaj magiaĵoj kaj poezio en prozo liaj verkoj ne estas tiel facile legeblaj kiel ekz. libroj de Hašek kaj Čapek.

Miroslav Malovec (Ĉeĥio)



Busto de Franz Kafka

Mezepoko konservita en moderno

La unuan mencion pri Prago, la plej okcidenta slava ĉefurbo, oni trovas ĉe la araba komercisto Ibrahim-Ibn-Jakub, kiu priskribis ĝin antaŭ pli ol mil jaroj kiel urbon de ŝtono kaj kalko, kie kruciĝas komercistaj vojoj.

Prago atingis la pinton de sia famo dum la mezepoko: en la 14-a jarcento ĝi estis la plej granda urbo de Mez-Eŭropo — kun la unua universitato norde de Alpoj, fondita en 1348. Ĝis nun bone konserviĝis la kvar mezepokaj urbopartoj: Staré Město (Malnova urbo), Malá Strana (Malgranda flanko), Hradčany (la Praga kastelo, kun sia ĉirkaŭaĵo) kaj Nové Město (Nova urbo). Sian gravecon Prago perdis dum la tridekjara milito (1620-1650), nove ekfloris dum la baroka epoko (17-a jc.), sed ne povis reveni al sia mezepoka rango.

En Prago vi malkovros arkitekturan juvelujon, kie troveblas katedraloj,

monumentoj kaj konstruaĵoj en ĉiuj stiloj — de romanika tra gotika, renesanca kaj baroka ĝis la stiloj modernaj.

Krom sia historieco, la nuntempa Prago (1 250 000 loĝantoj, areo de 496 km²) estas ankaŭ moderna kaj kultura urbo. Precipe konataj estas ĝiaj operejoj kaj koncertejoj, kiuj gastigas ekz. la mondfaman festivalon de klasika muziko “Praga printempo”.

Prago proponas agrablajn promenojn en grandaj parkoj. Centre de Prago situas populara monto, Petřín, kun same nomata turo (kopio de la Ejfelturo en kvinona grandeco); apud la kongresejo allogas parko ĉirkaŭanta la historiajn konstruaĵojn de Vyšehrad.

Iom pli for de la centro rekomendindas Stromovka kun siaj amuzejoj kaj ekspoziciejoj, i.a. konata subĉiela koncertejo kaj luma-muzika fontano de Křižík, sed ankaŭ, rande de Prago, la sovaĝaj rokoj de Divoká Šárka.

Rilate trafikon, Prago fieras pri moderna metroa sistemo, kun nur tri linioj, kiu estas rapida, belaspekta, facila por orientiĝi, kaj kun bona kunligo al la ceteraj urbaj trafikiloj (tramoj, aŭtobusoj). Por ĉiu transportilo validas unusama bileto (6 kronoj, eble altiĝos al 10); ĝi rajtigas al unu veturo, sen ŝanĝo de veturilo.

Manĝi kaj trinki oni povas eĉ surstrate ĉe multaj ĝiĉetoj, kiuj ofertas diversajn sandviĉojn (de 20 kronoj) kaj farunaĵojn (de 8 kronoj). Restoracioj kaj bierejoj en Prago estas multaj kaj diversnivelaĵ: eblas manĝi tre favore (ĉefplado jam de 50 kronoj), sed ankaŭ tro multekoste, dum kutima meznivela restoracio proponas ĉefpladojn ekde 150 kronoj.

Stanjo Chrdlová (Ĉebio)

Ni en Prago

Poetino Eli Urbanová raportas pri la farto de tiuj kreantoj kiujn ni kutimiĝis nomi “la Praga Skolo”.

Do denove UK en Prago — post 75 jaroj! Domaĝe ke ni ne estas pli junaj. Jiří Karen, poeto kiu aspektas kiel poeto, spertis jam kvin infarktojn. Li ĉiam tiel iniciatema. Ja li fondis artliteraturan sektion de ĈEA. Ja li organizis renkontojn kun renomaj ĉeĥaj aŭtoroj. Ja li gajnis por Esperanto sian kolegon Rumler.

Josef Rumler, la ĉefa piliero de nia rondeto, moviĝas pli multe en la loĝejo. Sidante ĉe sia skribtableto li sentas sin relative bone. Kiel “kabineta esperantisto” li pripensas ĉion de ekstere, sed des pli funde.

Kion diri pri mi. Mi ne plu deziras esti kiel Frina. Ne plu aktivas kiel antaŭe. Ne plu laboras en AdE. Ankaŭ al mi sufiĉas ke mi ankoraŭ vivas.

Iam ni (ne nur ni tri) kunvenadis en mia modesta apartamento por diskuti, kelkfoje eĉ verve disputi. Fruktodona periodo! Post la publikaĵo *Niaj aŭ-*

toroj sin prezentas al vi (1980) sekvis *En la koro de Eŭropo* (1983), *Kvarfolio* (1985) ...

Niajn opiniojn pri la bezono de riĉa sinonimeco eliranta el la ĉiutaga praktiko teorie formulis Josef Rumler en sia *Abunde kaj redunde* (1986) reaperinta en la *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo* en La Laguna

(1987). Eseo ŝoka por multaj esperantistoj. Ŝoka ne tiom pro la koncepto mem, sed ĉefe pro la aldonita glosaro. La “tempo de obskuro”, dum kiu ni estis senkompatate kritikataj, daŭris preskaŭ kvin jarojn ...

Voĉo de la popolo, voĉo dia. Iomete certe. Ni en Prago atente aŭskultas ĝin. Por pruvi tion mi donos al vi du



Eli Urbanová

Foto: Olga Svobodová

konkretajn ekzemplojn: Sur pli ol 300 paĝoj de mia aŭtobiografio *Hetaĵro dancas* (vd. p. 8) mi uzis 18 vortojn kiuj ne troviĝas en PIV. Sed ne sole mi "pliboniĝis". Ankaŭ Josef Rumler en sia *Tute eta nekompleta antologio el la nuntempa ĉeĥa poezio* (1989) preferis la fundamentan lingvon. Krom tio li tie aplikis sian novan akcent-nombran kaj senelizian poetikon. Miru, karaj oponantoj! Miru, kiel discipline ni pribremsis nian tro sovaĝan neologisman disflugon!

Kvazaŭ mi vin aŭdus: Vidu la Pragan Skolon! Kia malvenko! Sed...

Sed ne eraru: niaj tendencoj ne ŝanĝiĝis. Ni ne vidas en Esperanto nur ian helpan lingvon, nur universalan komunikan rimedon kiu ebligas al la homoj la bazan interkompreniĝon. Ni celas ke Esperanto plene egaligu al la lingvoj etnaj. Simple ke ni donu al la mondo lingvon kaj pli facilan kaj pli perfektan. Laŭ ni la vortaro ne estas ekskluzive objekto de la lingvistoj, sed ne malpli de la literatursciencistoj. Ĝuste la verkistoj grave influis, influas kaj influos la disvolvon de ĉiu lingvo. Ni ne subtaksas eĉ la rolon de fakuloj, male bonvenigas ĉiun profesie kompilitan terminaron kiu helpas la aferon ŝovi antaŭen, la medicinan, matematikan, filozofian... Ni tre aprecas ekzemple la laboron de la praga natur-scienculo Josef Kavka kaj de nia samlandano Jan Werner sur la kampo de la teknika terminologio. Niaj tezoj ree kaj ree prezentataj de Rumler restos al la dispono de futuraj kompetentuloj. Nenio perdiĝas. Same neniam perdiĝos la heredaĵo post Karolo Piĉ, kiu ne apartenis al nia praga rondo, kreis tute memstare, tamen kvazaŭ nin reciproke ligus nevidebla umbilika ŝnuro... Ni ĉiam sincere admiris lian artistan aŭdacon. Ni en Prago ne estas tiel riskemaj.

Niaj kunvenoj okazintaj regule en intima medio de mia buduaro, kunvenoj neforgeseblaj kaj inspiraj, tio estas jam paseo. Hodiaŭ ni laboras individue, ĉiu "sur sia persona sablito", kaj kontentiĝas per telefonaj kontaktoj. Ĉio grava estis dirita, ĉu ne.

Eli Urbanová (Ĉeĥio)

NOTOJ

AdE	=	Akademio de Esperanto
ĈEA	=	Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Frina	=	fama helena hetaĵro



Viziti Pragon kaj ne trinki kruĉon da biero en la mezepoka stablo U Fleků por multaj el ni ŝajnas peko.

Ses jarojn post la revolucio

En novembro 1989 la t.n. velura revolucio faligis komunismon en Ĉeĥio. Kiel poste evoluis la lando politike, ekonomie?

Ekde la unuaj liberaj balotoj la plej forta politika partio estas la dekstra ODS (Civitana Demokrata Partio), fronte kun la sperta ekonomikisto Václav Klaus, unue financministro, nun ĉefministro. La plej fortaj maldekstraj partioj, kreantaj opozicion, estas Social-Demokrata Partio kaj Komunista Partio de Bohemio kaj Moravio.

Nia relative stabila ekonomia situacio dankeblas certe al la ĉeesto de spertaj makro-ekonomikistoj en la politiko. La ĉeĥa krono firmiĝis rilate konverteblajn valutojn (pli ol 30 kronoj egalas dolaron en 1990, kaj proks. 25 CZK egalas 1 USD nun), kaj freŝdate ĝi eĉ fariĝis plene konvertebla. Relative malalta estas la inflacio: post la ŝoko en 1990, kiam la prezoj de preskaŭ ĉiuj bezonaĵoj kaj servoj subite grandskale altiĝis, la tutan tempon la inflacio ne superis 10% jare.

La ekonomia spektro de niaj civitanoj fariĝis vere bunta. Tavolo de riĉuloj ekzistas, precipe du grupoj: la rericivintoj de posedaĵo konfiskita fare de la komunisma reĝimo, kaj tiuj kiuj ekentreprenis tuj komence en ĝusta fako, kiu ĝis tiam vakis. Ankaŭ la nombro de malriĉuloj konsiderindas: ili estas precipe labor-perdintoj (kvan-kam la senlaboreco estas relative mal-

alta, ĉ. 3%), aŭ entreprenemuloj bankrotintaj. Malgraŭ regula valorigo de pensioj, ankaŭ multaj pensiuloj falis sub la nivelon de vivminimumo.

La Esperanto-movado ne rompiĝis sub la novaj kondiĉoj. Ĝi restis sub la komuna tegmento de Ĉeĥa E-Asocio, kun ununura escepto: sendependiĝis la sekcio kiu aktivas nun kiel Asocio de E-istaj Handikapuloj. La membraro de ĈEA malkreskis, kaj la asocio perdis sian ejon kaj profesion sekretarion. La unua fenomeno estas komprenebla en la nuna ekonómia situacio, kiam la meza generacio preferas al hobiaj fortan ekonomian strebon; la dua estas eltenebla pli facile ol en la ceteraj post-socialismaj landoj, ĉar la ŝtata subteno en Ĉeĥio neniam estis alta, do neniam nia asocio alkiutimiĝis al multnombra burokrata administrado. Sed la labormaniero devis ŝanĝiĝi por ke la agado ne stagnu: multajn aktivadojn nun transprenis kelkaj profesiaj firmaoj de esperantistoj, kaj la tasko de la ĈEA-komitato fariĝis pli-malpli kunordigi (anstataŭ mem regi) la E-aktivadon. Tial la estontecon de la E-movado en Ĉeĥio mi rigardas, same kiel la politikan kaj ekonomian evoluon ĝenerale, kun modera optimismo.

Petro Chrdle (Ĉeĥio)

Fondaĵo Karolo Piĉ establita

La 15-an de aŭgusto 1995, en sia naskiĝurbo Litomiŝlo, mortis la Esperanto-verkisto Karolo Piĉ. Tuj post lia morto familianoj kaj amikoj decidis starigi Fondaĵon Karolo Piĉ (FKP) kun la intenco teni viva la memoron pri la verkisto kaj zorgi pri la eldono kaj konstanta haveblo de liaj verkoj.

La fondaĵo estas establita ĉe Iltis-Eldonejo, kiu ĝis nun zorgis pri la eldono de la verkoj de Piĉ. En ĝi kunagas provizore: Ortwin Deubert (posedanto de Iltis-Eldonejo), Claude Gacond, Irmi Haupenthal, Reinhard Haupenthal (administranto de FKP), Marie Korwin (fratino de Piĉ), Herbert Mayer, Gonçalo Neves (literatura kunordiganto de FKP), Věra Onesorková (vidvino de Piĉ), Baldur Ragnarsson, Henri Vatré.

Celoj de la fondaĵo

1. Publik-rilata laboro

- 1.1 Havigi straton Piĉ en Litomiŝlo.
- 1.2 Fiksi memortabulon sur la naskiĝdomo en Litomiŝlo.
- 1.3 Starigi tomoŝtonon kun Esurskribo sur la tomo de Piĉ.
- 1.4 Sugesti prelegojn, studojn, simpoziojn ktp pri la verkaro de Piĉ.
- 1.5 Alvoki la esperantistaron kolekti kaj disponigi al FKP dokumentojn

pri Piĉ (korespondaĵoj, manuskriptoj, fotoj ktp).

1.6 Kolekti antaŭmendojn kaj mondonacojn por ebligi la aperigon de ĉiuj neeldonitaj verkoj de Piĉ.

2. Postlasaĵo

- 2.1 Zorgi pri la kolektado, konservado, ordigado kaj sistema indeksado de la postlasaĵo de Piĉ.
- 2.2 Eldoni katalogon de la biblioteko de Piĉ.
- 2.3 Eldoni kronologian liston de liaj korespondaĵoj.

3. Eldonado

- 3.1 Eldoni la prespretajn tajpaĵojn de Piĉ.
- 3.2 Prespretigi la finitajn manuskriptojn.
- 3.3 Redakti kaj prespretigi ĉiujn ceterajn manuskriptojn.
- 3.4 Reeldoni elĉerpitajn verkojn.
- 3.5 Protekti la aŭtorajn rajtojn de Piĉ.

4. Dokumentado

- 4.1 Pretigi kompletan bibliografion de la verkaro de Piĉ.
- 4.2 Prepari memor-volumon por la 80-jariĝo en la jaro 2000.
- 4.3 Eldoni katalogojn de la postlasaĵo (ktp. 2.2 kaj 2.3).

Kiel subteni la fondaĵon?

- Kontribui al la realigo de la celoj.
- Mendi la jam aperintajn verkojn de Piĉ.
- Antaŭmendi aperontajn verkojn, kiel *Ordeno de verkistoj* (romano, 380p, 63 germ. markoj) kaj *Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto* (531p, 75 gm).
- Helpi finance per mondonacoj.

Niaj kontoj

- En Germanio: Postbank Saarbrücken 20100-661 (Iltis-Eldonejo)
- En Francio: CCP Nancy 3971 34V (je la nomo de R. Haupenthal)
- Ĉe UEA: ilti-c (Iltis-Eldonejo) ★

Kion legi antaŭ Prago?


Abunde kaj redunde. Josef Rumler. Eseo pri diversaj stiloj. 1986. 32p. 4,50 gld.
El mia vivo. Vítězslav Nezval. Trad. J. Vondroušek. 1985. 12p. 3,90 gld.
El subaj fontoj. Eli Urbanová. Ilus. Sentoriĉaj, muzikplenaj versaĵoj. 1981. 96p. 6,90 gld.
En la koro de Eŭropo. Esperanto en arta kuirejo de ĉeĥaj poetoj kaj prozistoj. Komp. J. Rumler. 1983. 32p. 1,80 gld.
Flugilhava ŝtono. Jiří Karen. Trad. Jiří Kořínek. De poeto verkanta kaj ĉeĥe kaj Esperante. 1985. 238p. Ilus. 18,00 gld.
Gramatiko de la ĉeĥa lingvo. Miroslav Malovec. Konciza trarigardo. 1995. 27p. 3,30 gld.
Ĝojoj de mia vivo. A. Jirásek, K. Čapek kaj J. Šmíd. Elektitaj tradukoj de J. Vondroušek. 1984. 98p. 9,90 gld.
Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Iom da historio kaj iom da rememoroj. S. Kamarýt. 1983. 251p. 16,20 gld.
Intima triptiko. Div. ĉeĥaj aŭtoroj. Trad. R. Hromada. 1978. 72p. Ilus. 4,80 gld.
Konstruado en alto, La. Otokar Březina. Trad. T. Kilian. Eseo pri la signifo de homa kreado kaj laboro. 1982. 12p. 4,50 gld.
Kvarfolio. Kořínek, Rumler, Urbanová, Vidman. Versoj de Pragaj poetoj. 1985. 32p. 3,00 gld.

Niaj aŭtoroj sin prezentas al vi. Dek poemoj de dek poetoj. 1980. 15p. 3,30 gld.
Nova Ezopo. Štefo Urban. Kolekto de spritaj originale verkitaĵoj versaj fabloj, kun forta satira enhavo. 1961. 128p. Ilus. 7,50 gld.
Nur tri kolorojn. Eli Urbanová. Pasiaj poemoj kun volupto kaj ardo. 1960. 139p. 7,50 gld.
Ondro kaj drako. Viktor Dyk. Trad. J. Vondroušek. Dramo pri vilaĝanoj kiuj ne scias ĉu kredi je drakoj. 1986. 46p. 4,50 gld.
Poeto ne mortas. Antologieto el la verkaro de František Kožík. Trad. Jiří Karen. 1984. 31p. Ilus. 1,80 gld.
Propra biografio de Karolo la IV-a, La. Trad. J. Vondroušek. Aŭtobiografio de la plej estimata ĉeĥa suvereno kaj rom-germana imperiestro. 1995. 87p. 12,00 gld.
Rakontoj 1. Francisko Kafko. El la germana trad. V. Lutermano. 1993. 35p. 6,00 gld.
Riporto skribita en la pendumila maŝo. Julius Fučík (1903-1943). Trad. R. Hromada k.a. Rememoroj de kontraŭfaŝisma ĵurnalistoj el nazia karcero. 1979. 110p. Ilus. 11,70 gld.
Romeo, Julieta kaj la tenebro. Jan Otčenášek. Trad. V. Váňa. Pri amo de juda knabino kaj ĉeĥa knabo en Prago. 1965. 175p. 7,50 gld.
Sileziaj kantoj. Petr Bezruč. Trad. T. Pumpr. J. Kořínek, R. Hromada. 1970. 123p. 2,40 gld.

Skandalo pro Jozefo, La. Valdemar Vinař. Romaneto laŭ biblia rakonto. 1981. 68p. Ilus. Mimeo. 6,60 gld.
Sur la sojlo de la amo. Markéta Procházková. Trad. J. Kořínek. Poemaro de juna ĉeĥa poetino. 1986. 96p. 9,00 gld.
Travivaĵoj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito, La. Jaroslavo Hašek. Trad. J. Štadler. Aventuroj de (ŝajn)naŭvulo. La unuaj dek ĉapitroj. Reeldono de traduko el 1932. 1995. 152p. 13,50 gld.
Tridek jaroj. Faktoj pri Ĉeĥoslovakio. 1976. 42p. Ilus. 2,40 gld.
Tute eta nekompleta antologio el la nuntempa ĉeĥa poezio. Trad. J. Rumler. 1989. 36p. 6,00 gld.
Velký slovník česko-esperantský. Jan Filip, Karel Filip. 1989 (reprezo el 1949). 352+302p. 21,00 gld.
Velký slovník esperantsko-český. Jan Filip, Karel Filip. 1989 (reprezo el 1949). 256+188p. 13,50 gld.
Vitreroj. Poeziaĵoj el 1949-1976. Jiří Kořínek. 1976. 88p. 4,50 gld.
Vortaro Esperanta-ĉeĥa. Karel Kraft, Miroslav Malovec. 1995. 239p. 26,40 gld.

Antaŭ la UK la eldonejo KAVA-PECH aperigos gvidlibron pri Prago, koncizan lernolibron de la ĉeĥa lingvo, kaj rakontaron de Franz Kafka.

Recenzoj



Du dementoj al mortanenco

Milito kontraŭ salamandroj (1936). Karel Čapek (1890-1938). El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek (1904-1995). Dobřichovice/Praha: KAVA-PECH/ĈEA, 1994. 197p. 18,00 gld. **Ne nur soldato Ŝvejk. Elektitaj rakontoj.** Jaroslav Hašek (1883-1923). El la ĉeĥa trad. Stanislav Kamaryt k.a. Red. Miroslav Malovec. Dobřichovice: KAVA-PECH, 1994. 246p. 20cm. 25,50 gld.

La 1-an de julio 1995 aperis en la prestiĝa ĉeĥa taggazeto *Li-dové noviny* la artikolo "Esperanto mortas (la lasta)". Ĝia aŭtoro provas doni la impreson al la ĉeĥaj legantoj ke Esperanto mortas, kiel la lasta el ĉiuj ĝisnunaj artefaritaj lingvoj. Ĉulis-ciis dum li verkis tiun artikolon ke en la lando kie laŭ li Esperanto mortas, iom pli frue aperis la du Esperantaj tradukoj ĉi tie recenzataj?

Miaopinie Esperanto vivas antaŭ ĉio en literaturo, precipe en libroj eldonitaj. Almenaŭ ĉi-rilate mi havas la impreson ke nun, ses jarojn post la demokratia revolucio, la E-movado en Ĉeĥio pli viglas ol sub la komunista regado. Jes, ĉefe dank' al la entreprenemo de Petr Chrdle, kiu fondis la privatan firmaon KAVA-PECH kaj heroe eldonadas Esperantajn librojn.

Ne nur soldato Ŝvejk havas kelkajn neglataĵojn, kiel nepre evitenda ĉeĥismo en la rakonto *En la malgranda drogejo*: la ĉeĥa pronomo por oni estas esperantigita laŭvorte "ili", dum kuntekste ĝi signifas simple "vi".



Jaroslav Hašek

La libro de Čapek malhavas la necesan enkondukon pri la aŭtoro kaj la romano, kiun feliĉe havas tiu de Hašek. Malgraŭ tiuj mankoj, ambaŭ libroj estas legindaj por pli bone koni tiujn du literaturajn geniojn ĉeĥajn.

La kvaliton garantias ankaŭ la tradukintoj: i.a. Váňa, Kníchal kaj Vondroušek, kies kompetenton pruvis jam pli fruaj tradukoj el Čapek.

KURISU Kei (Japanio)

Galileo eduka

Lumo en tenebroj. Dolorplena kaj heroo vivo de J. A. Komenio (1958). František Kožík (1909). El la ĉeĥa trad. Z. Rusín kaj M. Malovec. Praha: Ĉeĥa E-Asocio, 1992. 121p. 21cm. 14,40 gld.

Kiam polaj regimentoj invadis la urbon Leszno en 1656, incendie pereis multo el la 250 verkoj de la ĉeĥa teologo, filozofo, lingvisto, pacifisto kaj, antaŭ ĉio, *humanisto* Johano Amoso Komenio (1592-1670). Jen unu el la kialoj de lia nesufiĉa konateco. Sed la ĉefa kaŭzo estas ke la mondo de la 17-a jarcento neniel povis toleri la pikojn de la senfalsa plumo de Komenio, kiu senkompromise luktis kontraŭ ĉia hipokriteco.

La libro prezentas la vivon kaj, specimene, la verkaron de Komenio, kiu naskiĝis en malfacilan tempon. Kiel "ĉeĥa frato" (branĉo de la husana reformismo) li plej proksime spertis la konsekvencojn de la katolika-evangelia konflikto kiu ekflamis post kiam imperiestro Ferdinando konkeris Ĉeĥion en 1620. Pro la persekuto al la evangelianoj kaj al ĉio ĉeĥa, la ĉeĥaj fratoj fine devis fuĝi eksterlanden. Por Komenio estis evidente ke la mizerecon kaŭzas misgvidado de la homaranoj ekde la plej juna aĝo, kaj li engaĝis sin porti *lumon en la tenebrojn* kreante didaktikan sistemon por la tuta eduka tempo. La principoj estis revoluciaj — lernejoj por ĉiuj, riĉaj kaj malriĉaj, viroj kaj inoj, urbanoj kaj ruranoj — kaj la metodoj ravas eĉ hodiaŭ: kunlaboro inter gepatroj kaj lernejo; sistema instruado de ĉiu scienco, en diferencaj manieroj laŭ la aĝo; senĝena diskuto inter la instruisto kaj la gejunuloj, kaj klerigado tra ludoj kaj teatraĵoj.

Aparte interesa por esperantistoj estas lia metodo instrui lingvojn. En sia lernolibro de la latina li insistis ke infanoj devas lerni frazojn laŭ sia propra sperto. Eĉ plie, Komenio kiel pacifisto celis kunigi la homaron en tutmonda ŝtato kun internacia lingvo, *panglotio*.

Komenio estis forgesita dum la renesanco. Nur en la 19-a jarcento oni denove malkovris tiun "Galileon de edukado" (Jules Michelet), kaj eĉ hodiaŭ li ne ŝajnas laŭmerite agnoskita. Sed per tiu ĉi libro ĉiu povas nun aŭdi la voĉon de Komenio, ankoraŭ vizian tra abismo de pli ol tri jarcentoj.

Jesper Lykke Jacobsen (Danio)



Ilustraĵo de Karel Oberthor
el *Nur tri kolorojn* (1960)

Incitnudiĝo de animo

Hetajro dancas. Eli Urbanová (1922). Chapecó: Fonto, 1995. 327p. 21cm. 51,60 gld.

Romanoj iom aŭ tre aŭtobiografiaj ne mankas en Esperanto. Nun tiu de Urbanová — aŭ de Eli, kiel la intimiĝinta leginto ŝatus ŝin nomi — vicigas merite post tiel diversaj verkoj kiel *Metropoliteno* de Varankin, *Adolesko* de Vaha, *Ombro sur interna pejzaĝo* de Ŝtimec.

Ĉi tiujn ĝi eĉ superas per la pluso de preskaŭ konsterna nekaŝemo: la aŭtorino ne hezitas nudigi sian animon, kaj foje sian korpon, antaŭ niaj okuloj. Dum ni kunvivis kun ŝi penoplenan rilaton kun la edzo Ŝtefo Urban, letere platonan adoron al Julio Baghy, grandiozan amon al Jan Zemek kaj aŭtunece mildan kunvivon kun Ernesto Chira, ŝi nin regalias ankaŭ per impresaj portretoj de esperantistoj famaj aŭ nekonataj, precipe ĉeĥaj. Rigardo movadema

kaj rigardo intimema trovos same multon en la libro. Nur historiistoj paŭtos — duonjarcento da ĉeĥa historio preskaŭ komplete mankas el la fono. Sed tio eĉ enordas en verko ĉi tiom intime mi-a.

Simile malgravas manpleno da lingvaj dubindaĵoj, kiel stranga, ŝajne kondicionala, uzo de infinitivo (“Ne havi Erneston mi posedus hodiaŭ aŭton”, p. 311), aŭ la uzo de *po-* antaŭ verbo por signifi ripetan agon. Riĉe ja kompensas tiu “pulso per tono de rekta parolo” kiun Rossetti laŭdas preface.

Frاندintoj de la poezio de Urbanová nun havas ŝlosilon al ties sekretoj; kiuj ne konas ŝiajn versojn, tiuj nun volos legi *Nur tri kolorojn* kaj la aliajn poemojn.

István Ertl (Nederlando)

Defende al du vortaroj

Niaj recenzoj (okt., p. 172-173) pri la grandaj vortaroj angla-Esperanta (Benson) kaj franca-Esperanta (Le Puil-Danvy k.a.) provokis du rimarkindajn reagojn.

Jes, ĝi “rompis la rekordon”!

Komparinte 18 paĝojn (malpli ol 3% el la 607 paĝoj) de *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (CEED) de Peter J. Benson kun la respondaj partoj en *Esperanto-English Dictionary* (ED) de J.C. Wells, E. Grimley Evans (EGE) faras kelkajn rapidajn — kaj ne nepre ĝustajn — konkludojn.

— CEED estas unudirekta, dum ED dudirekta, sekve tiu ĉi estas pli bona.

— CEED ja havas 8 000 vortojn pli ol ED (40%), sed tio ŝajne apenaŭ gravas, ĉar “ili estas precipe nomoj”.

— Laŭ EGE, “por beletra tradukado neniu estas evidente pli bona ol la alia”. Probable, kvankam dubinde. Sed CEED taŭgas ne nur por beletra tradukado. EGE ŝajnas malagnoski ke la plej legataj sciencaj kaj teknikaj eldonaĵoj estas — malfeliĉe — plejparte en la angla.

— Kiam EGE tamen trovas ion pozitivan en CEED, li tuj hastas trovi ankaŭ ion malbonan tiurilate. Iujn pozitivajojn li ne rimarkas: ekz. ke CEED senescepte indikas la transitivecon de verboj, dum ED nur esceptokaze faras tion.

— Laŭ EGE “Wells estas brita, dum Benson estas usona”. Prave, se temas pri aŭtoroj. Sed nur supra foliuminto kuraĝas aserti ke CEED estas samgrade usona kiom ED estas brita. Ekz., variantojn en literumado CEED zorge indikas, dum ED apenaŭ ĝeniĝas pri ili. EGE plendas pri la manko de prononcindikoj same en ED kiel en CEED, kaj li eĉ kuraĝas doni ekzemplan artikolon ... kun prononcindiko. Sed li evitas mencii ke lia indiko estas brita, neniel universala. Jen la kialo de la nezorge kaŝita malŝato de EGE al CEED: la antinomio brita-usona.

Fine, mi trovis iom ironia ke EGE komparas unudirektan vortaron kun dudirekta, sed tute ne mencias la alian unudirektan angla-Esperantan vortaron (*English-Esperanto Dictionary* de Fulcher-Long), kiu multfoje montriĝas nekompareble pli riĉa ol ED.

Ionel Oneț (Usono)

Neinformiteco povas erarigi...

De la apero de *Grand Dictionnaire Français-Espéranto* (GDPE), ni neniam reagis al iu ajn recenzo. Ni ne intencas

“rebati” tiun de E-D. Krause, sed kelkajn precizigojn ni volas alporti.

Unue: GDPE estis verkita ne nur de Le Puil kaj Danvy, sed ankaŭ de pluraj aliaj homoj: G. Cau, J-P. Beau, L. L. da Silva, A. Le Quint kaj A. Gilles. G. Lagrange, A. Cherpillod kaj J-L. Texier ne nur kontrolis la provaĵojn, sed ankaŭ faris trafikajn sugestojn.

Due: ĝis nun neniu rimarkigis ke “tia” GDPE (kun tiom da kapvortoj, tradukitaj esprimoj, kaj eventuale sinonimoj) ne aperis de pli ol 60 jaroj! Unuavide, tiu situacio tute ne ĝenis la “francajn moŝtulojn”, malgraŭ ke la du lingvoj multe evoluis dum tiu periodo. Tial nia decido kaj jaroj da laboro.

Kaj hodiaŭ moderna GDPE ekzistas. “Sendube via vortaro havas difektojn kaj erarojn ... sed ĝi estas tre bona kaj utila vortaro. ... Ĉu eble nur persono kia mi, kiu jam faris nacilingvajn vortarojn povas admiri vian laboron?” — skribis Manuel de Seabra al Le Puil.

Kompreneble nun reviziado estos — relativa — bagatelaĵo. Sed antaŭ ĉio nepris fari tiun vortaron.

Plie iun punkton ni refutas: *mar-trinki, planverki, voĉdoni* ktp (kiel la Zamenhofa *bondeziri*) ’stas por ni vivanta E-o. “Leksikografoj” ne devas esti singardaj; male, ili devas reflekti la hodiaŭan lingvon.

J. Le Puil kaj J-P. Danvy (Francio)

Subvencioj laŭ severaj kriterioj

FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj distingas per sia prestiĝa 5-a Esperanto-Kulturpremio de Aalen (10 000 germanaj markoj), la brazilan eldoniston Gersi Alfredo Bays. Krome FAME starigis sciencan premion je 3000 markoj. Ni parolis kun FAME-prezidanto Stefan Maul.



La fondaĵo publike serĉis kandidatojn por sia kultur-premio. Kiom da kandidatoj aperis?

Mirige multaj, entute dek tri. Tamen ni povis dekomenca elkribri multajn ne konformajn al ĉiuj necesaj kriterioj.

Ĉu do ne ekzistas sufiĉe da seriozaj kandidatoj por tia premio?

Ho jes ja, el la restintaj proponitoj ni povus kompili imponan liston, kvankam eĉ pluraj pri kiuj ni en la estraro mem pensis, tute ne estis menciitaj. Sed por ne tro balasti la kunvenon de fondintoj, la estraro ja devas proponi por fina elekto kaj decido nur la plej respektindajn kandidatojn.

Kiuj argumentoj decidigis por Bays?

La pravigo kiun la kunveno trovis en la oficiala propono tekstis jene: “Bays, instruisto loĝanta en fora regiono de suda Brazilo, en 1977 apud profesie komencis prezinde kompostadi por E-eldonejoj. Tiel li ebligis ekzemple aperigon de la monumenta *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* de Kalocsay/Waringhien. En 1980 li mem fondis eldonejon kaj de tiam publikigis pli ol 60 librojn. Fine li ekde oktobro 1980 eldonas la monatan literatur-revuon *Fonto*. En ĝi aperis kontribuadoj de la plej bonaj literatoroj; krome en ĝi — kaj nur tie — povis debuti ankaŭ multaj novaj talentuloj. Per intertempe preskaŭ 200 numeroj *Fonto* fariĝis la plej ampleksa literatura revuo en la E-historio. Kaj ĉi ĉion Bays realigis sub plej malfavoraj ekonomiaj cirkonstancoj kaj multaj personaj oferoj.”

La du aliaj kandidatoj kiujn la estraro proponis, estas simile meritplenaj, sed ili laboras en socie kaj persone pli favora medio kaj — ne malgrava aspekto — ne bezonas la premiemonon. Bays, kontraste, ne nur bezonas monon

sed sendube investos la 10 000 markojn por pliaj projektoj. Plie — ne malgrave — FAME per tiu ĉi decido emfazas sian tutmondecon: escepte de Ludovikito, ĉiuj antaŭaj premiitoj estis eŭropanoj. La E-movado ofte neglektas ke en Sud-Ameriko aktivas bonegaj esperantistoj.

Apartan sciencan premion planis jam la intertempe mortinta FAME-fondinto Alois Meiners. Laŭ kiaj kriterioj oni starigis ĝin nun?

La kriteriojn ellaboris d-ro Reinhard Fössmeier (Munkeno), en kunlaboro kun pluraj kuratoroj de FAME. Ni devis atenti ke la FAME-premio ne koliziu kun aliaj sciencaj aŭ similaj premioj. Gravus ke ni povas distingi kaj jam finitajn laborojn kaj estontajn projektojn, kaj ke kandidatoj povas esti individuoj kaj grupoj.

Vi decidis ankaŭ pri subteno de projektoj en 1996.

El la multaj petoj ni devis elekti, por ne transiri la kadron de 15 000 markoj por la financa jaro — impona cifero, ĉu ne? La plej grandajn sumojn

FAME disponigas por du vere gravaj verkoj: libro pri Zamenhof-objektoj de Hugo Röllinger, eldonota de UEA, ricevos subvencion de 5000 markoj. Subvencio de 3000 markoj kaj kredito de 5000 markoj iras al *Hungara-Esperanta Vortaro*, eldonota de Hungara E-Asocio. Krome FAME subtenos ekzemple la junularan programon de la venonta Eŭropa E-Kongreso en Stuttgart, vojaĝon de Cseh-instruisto Atilio Orellana Rojas tra Sudameriko, kaj eldonon de sociologia verko kiu analizas la germanan E-movadon.

Kiuj projektoj ne havas ŝancon ĉe FAME?

Ni ja devas severe atenti ke la donacita mono vere estu uzata laŭ la kriterioj de nia statuto, i.a. profesieco de la projekto kaj garantio pri sukceso.

Ĉu vi povis kontentigi ĉiujn petintojn kiuj meritas laŭ la statuto?

Ne. Kvankam denove kreskis la nombro de kunfondintoj, do personoj kiuj donacas minimume 1000 germanajn markojn, FAME aprezas pliajn donacojn. ★

La konto de FAME: Kreissparkasse Ostalb, Aalen, BLZ (bankkodo) 61450050, konto n-ro 110000787. Informkajereton pri FAME-fondaĵo oni petu de: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio.

Scienca premio de FAME

Laŭ decido de kunveno de fondintoj la 11-an de novembro, FAME starigis sciencan premion de 3000 germanaj markoj, kiun ĝi atribuos ĉiun duan jaron — unuan fojon en 1997 — laŭ §3 de la statuto. La distingo povas esti atribuita kaj kiel agnosko de jam finitaj laboroj kaj sub aspekto de ekiga financado por estontaj projektoj. Kiel aparte premiindaj estas rigardataj: internaciaj terminaroj; fakaj instrulibro kiuj precipe povas utili al homoj en evolulandoj; laboroj en la kampoj interlingvistiko kaj esperantologio. La premio estas ligita al personoj aŭ person-grupoj.

Kriterioj: 1. La ellaboraĵo estu bone prezentbla al iom larĝa publiko. 2. Se temas pri interlingvistiko kaj/aŭ esperantologio, ĝi utilu por enkonduko de tute novaj kaj gravaj vidpunktoj aŭ esence kontribuu al akceptigo en lingvistaj rondoj. 3. Fakterminaroj estas premiindaj precipe se ili respondas al urĝa bezono. Gravaj estas kunordigaj agoj de terminologia laboro kaj la starigo kaj tenado de kontaktoj kun ekster-movadaj organizaĵoj. 4. Instrulibro por klerigo en evolulandoj estas altgrade subvenciindaj. Tiurilate la plej granda problemo ofte estas ne la kreado de tiaj libroj, sed iliaj akceptigo kaj utiligo en la celataj landoj. Ĉe premiado tiukampa do estu atentata kohera koncepto, al kiu apartenas organiza kaj politika realigo.

Petojn kaj proponojn oni direktu al la estraro, kiu — por trovi decidon — en kazo de bezono povas komisi al unu aŭ pluraj kuratoroj starigon de ekspertizo. La estraro havigas por la decido la aprobon de la kunveno de fondintoj.

Pri la lingva reĝimo de UN

La tutmonda organizo Unuiĝintaj Nacioj praktikas malpli demokratian lingvan reĝimon ol la kontinent-skala Eŭropa Unio (jun., p. 102). Jen klarigo pri la historia fono.

Lige al la statuso kiun lingvo povas havi kiel komunikilo en internaciaj organizaĵoj aŭ arandoj, oni distingas ĉefe “oficialajn lingvojn” (*official languages, langues officielles, Amtssprachen*) kaj “laborlingvojn” (*working languages, langues de travail, Arbeitssprachen*). La preciza diferenco ne estas klara. Proksimume validas ke en la oficialaj lingvoj devas aperi ĉiuj gravaj dokumentoj kaj devas esti interpretataj ĉiuj gravaj paroladoj. La laborlingvoj servas al la ĉiutaga laboro de la organizaĵo kaj pro tio fakte estas pli altstatusaj ol la oficialaj lingvoj. Oni devas distingi ankaŭ inter la *jure fiksita* kaj la *fakta* roloj de la lingvoj.

En artikolo 111 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (UN) oni deklaris ke la tekstoj ĉina, franca, rusa, angla kaj hispana (en tiu vico) estas same oficialaj. En la Rezolucio I de la Ĝenerala Asembleo de UN (RĜA), de 1 feb. 1946, oni deklaris tiujn lingvojn “oficialaj”. “Laboraj lingvoj” ĝis 1948 estis nur la angla kaj la franca.

En 1948 sekvis la hispana (RĜA 247[III], 7 dec. 1948), kaj nur en 1968 la rusa (RĜA 2479[XXIII], 21 dec. 1968).

Ĝis 1971 la oficiala ĉina reprezentanto en UN estis Tajvano, kies delegitoj parolis la anglan, ne insistante pri sia rajto je la ĉina. Tio ŝanĝiĝis en

1971, kiam Ĉina Popola Respubliko ekanstataŭis Tajvanon en UN. De 1973 ĝis 1977 daŭris la paŝon-post-paŝa enkonduko de la ĉina kiel laborlingvo en la lingvan reĝimon de UN (RĜA 3189[XXVIII], 18 dec. 1973).

Pro la ĉiam pli vigla rolo kiun ludis la arabaj landoj sur la monda scenejo, kaj sekve ankaŭ en UN, la araba ekde 1973 fariĝis samtempe oficiala kaj labora lingvo (RĜA 3190[XXVIII], 18 dec. 1973), sed en la Sekureca Konsilio (SK) nur ekde 1982. UN do nuntempe havas ses oficialajn lingvojn, kiuj samtempe estas laboraj. Tio forviŝas la pli fruan statusan diferencon.

Laŭ postulo de la siatempe du germanaj ŝtatoj kaj Aŭstrio la germana ricevis duonoficialan statuson ekde 1975 kaj fariĝis “dokumenta lingvo” (RĜA 3355[XXIX], 18 dec. 1974), kio signifas ke en ĝin oni *tradukas* diversajn gravajn dokumentojn sed ne interpretas el/en la lingvo(n).

Nur en la Internacia Kortumo la oficialaj kaj laboraj lingvoj estas la angla kaj la franca.

Tiu jura situacio validas por la ĉefaj organoj de UN, i.a. por la Asembleo kaj la SK, kaj implicas ke la kostojn tradukajn kaj interpretajn portas UN.

Se Germanio eniros en la SK-on kiel konstanta membro, la premo por akceptigi la germanan kiel sepan lingvo-

von de UN povos fariĝi pli forta. Provoj oficialigi plian lingvon, ekzemple la hindan, portugalan aŭ japanan, restis sensukcesaj — almenaŭ ĝis nun.

Ne estas neimageble ke la rolo de la japana kreskos, se ankaŭ Japanio fariĝos konstanta membro de la SK.

La specialaj organizaĵoj de UN, ekzemple Unesko, Internacia Labor-Organizaĵo aŭ Internacia Civil-Avia



Jam la usona prezidento Eisenhower malkontentis pri la lingvaj servoj ĉe UN...

Organizaĵo, havas siajn proprajn lingvopolitikajn regulojn.

Por atingi bonan kvaliton, la fakuloj de la traduka kaj interpreta servo de UN ĝenerale tradukas el la fremda lingvo en la gepatran, kio postulas por 6 lingvoj 30 lingvo-kombinojn. Ĉar ne ĉiam la servo povas disponigi interpretistojn por la bezonataj lingvo-kombinoj, oni aplikas la “relaksan metodon” (kp. jun. ’95, p. 102), kio malaltigas la kvaliton de la interpretaĵo. La kostoj por la lingva servo enestas en la buĝeto de UN, kiu, laŭ indiko de ĝenerala sekretario Pérez de Cuellar, por 1984-1985 estis 2,3% de la tuta buĝeto. En 1987 en la oficejoj de UN en Novjorko kaj Ĝenevo profesie laboris 437 tradukistoj kaj 266 interpretistoj. Al tiuj, ĉe okazaj bezono-

Rezolucio por multlingveco

Reage al la tendenco ke la ses oficialaj lingvoj de UN (angla, araba, ĉina, franca, hispana, rusa) kaj la laborlingvoj de la Sekretariato (angla, franca) estas uzataj en la organizo ĉiam malpli egale inter si, la Ĝenerala Asembleo rezoluciis jene la 17-an de okt. 1995:

“(…) **konsiderante** ke la buĝetoj de UN por tradukado kaj interpretado devus esti proporciaj al la bezonoj kaj ne submetitaj al buĝetaj limigoj, (…)

notante ke la principon de egaleco de la oficialaj lingvoj pli kaj pli ofte pridubigas la okazigo de t.n. “malaltkostaj” neformalaj kunsidoj, (…)

[la Ĝenerala Asembleo] **memorigas** ke la Sekretariato estas devigita uzi en siaj rilatoj kun la Membroj-Ŝtatoj tiun oficialan aŭ laboran lingvon kiun tiuj petas;

petas la Ĝeneralan Sekretarion certigi ke la personoj dungitaj de (...) la Organizo regu kaj uzu almenaŭ unu el la ses oficialaj lingvoj aldone al unu laborlingvo de la Sekretariato; (...) **emfazas** la neceson certigi, precipe per trejnado kaj dungado de fakuloj, ke estu disponeblaj la necesaj rimedoj por garantii la ĝustan kaj ĝustatempan tradukadon de dokumentoj en la diversajn oficialajn kaj laborajn lingvojn de UN;

memorigas ke necesas certigi la samtempan disdonadon de tiaj dokumentoj en la oficialaj lingvoj de la Organizo;

urgas la delegaciojn de la Membroj-Ŝtatoj ke ili klopodu eviti okazigon de neformalaj kunsidoj sen interpretado (...).”

noj, aldoniĝas pliaj liberprofesiuloj. En la ĉiutaga praktiko tamen ekzistas "faktaj laborlingvoj", nome la angla kaj la franca.

La aktuala lingva reĝimo de UN estas diskriminacia. Ĝi certe ne estos eterne stabila kaj povos ŝanĝiĝi, depende de ŝanĝiĝoj de la politika pezo de ŝtatoj aŭ ŝtataj grupoj.

Detlev Blanke (Germanio)



Lingvoproblemo estas bombo

Ĉirkaŭ 50 diversfakaj sciencistoj partoprenis la konferencon "Lingvopolitiko en Eŭropo" (6-8 okt., Marburg, Germanio).

Ĝi "elstaris, diference de similaj aranĝoj, pro tre kompleksa pri-konsidero de la eŭropa lingvoproblemo kaj pro la partopreno de gravaj fakuloj" — skribas Detlev Blanke en *Esperanto aktuell*.

En la ĉefreferaĵo "Lingvopolitiko kaj lingvodisvastiga politiko" prof. d-ro Herbert Christ pledis por ke ĉiu eŭropano lernu unu aŭ plurajn lingvojn, sed ne ĉiuj la samajn. Li opiniis ke Esperanto ne taŭgus kiel interkomunika lingvo, jam pro tio ke ĝi kiel planlingvo — laŭ li — ĉiam dependus de lingvoplanada aktivado kaj ne povus evolui nature.

La renoma prof. Ulrich Ammon, male, ne dubas pri la ebloj de E-o, sed ja pri la politika realigebleco de ties ideo. Laŭ li, "tre bedaŭrinde, E-o ne sukcesis", kaj la angla estas la sola reale mondvasta interkomunika lingvo.

Prof. Robert Philipson, aŭtoro de libroj pri lingva imperiismo kaj lingvaj homraĵoj, tre kritike referis pri la

lingvodisvastiga politiko de Britio kaj pri la tutmonda influo de la angla, kaj nomis Esperanton la sola alternativo por la nuna situacio. "Se oni ne subtenas Esperanton, oni helpas la anglan."

Ĝenerale, malgraŭ la titolo de la konferenco, centre staris la rolo de la germana lingvo, kiun (kaj la germanan ekonomion) la nuna situacio malfavoras. Malofte oni menciis ke aliaj nacioj havus nenian avantaĝon el pli forta rolo de la germana lingvo, kaj emis pretervidi ke tia sinteno nur daŭrigas la nunan konkurencadon de naciaj lingvopolitikoj, dum eŭropa lingvopolitiko fakte mankas. Oni ja diskutas je alta nivelo pri diversaj demandoj de la eŭropa unuiĝo, sed ne pri la lingvoproblemo, ĉar la temo estas "bombo" (vorto de Uwe Korch, oficisto de la Eŭropa Parlamento) kiun oni timas preni en la manojn, kvankam estus jam tempo malprajmi ĝin.

Laŭ raportoj de Detlev Blanke kaj Frank Stocker (Germanio)

Informkampanjo ĉe EP-anoj

Germain Pirlot enketas ekde marto 1995 pri la opinio de belgaj membroj de Eŭropa Parlamento (EP) rilate la eŭropan lingvoproblemon. Li raportas pri la evoluo de sia kampanjo.

Lerneja enkonduko de Esperanto dependos de politikistoj. Sekve ni regule, objekte, sentrude informu ilin. Ĉar Esperanto estas supernacia helplingvo, ĉe la eŭroparlamentanoj ni klopodu akceptigi la ideon pri eventuala uzado de tia lingvo, por helpi solvi en Eŭropa Unio — ne nur sine de ties instancoj — la lingvan problemaron.

Pri ĉi tiu ideo mi petis letere la opinion de la 25 belgaj EP-membroj. Mi substrekis ke la celo estas diskonigi la opiniojn. Nur 4 el la 25 reagis. Tiujn respondojn mi resendis al ĉiuj, kaj venis 3 pliaj reagoj. Iom post iom entute 13 EP-anoj kuraĝis esprimi sin pli-malpli favore al Esperanto, verŝajne ĉar ili konstatis ke ankaŭ kolegoj ne kontraŭas ties eventualan uzadon.

Nepras organizi similan enketon en

ĉiuj EU-landoj. Intertempe 47 el la 626 EP-anoj (ĉ. 7%) — el Belgio, Britio, Francio, Irlando, Italio kaj Luksemburgio — esprimis pli-malplian subtenon al eventuala uzado de Esperanto por solvi la lingvan problemaron de EU. Verŝajne estas pliaj kiuj simpatias Esperanton; ni informu ilin!

Helpu vian landan kunordiganton, aŭ surprenu la kunordigan taskon en Aŭstrio, Finnlando, Germanio kaj Luksemburgio, kie tia kunlaboranto ankoraŭ mankas.

*Germain Pirlot
Steenbakkersstraat 21
BE-8400 Oostende, Belgio*

Red.: Al petantoj ni povas sendi nomojn kaj opiniojn de eŭro-parlamentanoj subtenantaj Esperanton, kaj liston de la landaj kunordigantoj.

LITERATURO

AMMON, Ulrich (1991): *Die internationale Stellung der deutschen Sprache*. Berlin-New York: de Gruyter.

EFIMOV, Alexander S. / Schumm, Siegfried (1988): Direktado de interpretadaj servoj en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj. En: *Language Problems & Language Planning* 12/2 (1988), p. 152-168.

HARRY, Ralph / Mandel, Mark (1979): *Language Equality in International Cooperation*. (Esperanto Documents, new series 21 A). Rotterdam: UEA.

LAPENNA, IVO (1969): La situation juridique des "langues officielles" avant la fondation des Nations Unies. En: *La Monda Lingvo-Problemo* 1/1 (1969), p. 5-18.

OSTROWER, Alexander (1965): *Language, Law and Diplomacy. A Study of Linguistic Diversity in Official International Relations and International Law*. Du volumoj. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.

PAQUÉ, Ruprecht (1980): *Sprachen und Sprachendienst der Vereinten Nationen*. En: *Vereinte Nationen* 28/5 (1980), p. 165-171.

Lanterno por la mondo

Moderna konferencejo de Univ. Wonkwang (urbo Iksan) gastigis la 264 aliĝintojn de la 27-a Korea Kongreso de E-o (28-29 okt.).

Partoprenis 27 eksterlandaj esperantistoj el 11 landoj. Kvankam formiĝis Dua Azia Karavano por venigi diverslandajn azianojn al la japana kaj korea kongresoj, pro vizoproblemo nur U. Zeiter Perera el Srilanko kaj Firdaŭs Ŝukurov el Taĝikio sukcesis atingi Koreion.

Post informa kunsido pri la Unua Azia Kongreso (22-26 aŭg. 1996, Ŝanhajo) kun LKK-estro prof. WEI Yuan-shu, en la solena inaŭguro paroladis la prezidanto de KEA, d-ro LEE Chong-yeong, petante la kongresanojn fariĝi brila lanterno ne nur por Azio, sed por la mondo. Gratulvortis d-ro SONG Chon-un, rektoro de la universitato. La ĉefmajstro de ŭonbulismo (vd. apude), LEE Kwangjeong, gratulprelegis emociplene kaj kuraĝige.

En la kongreso LEE Chong-yeong demisiis kiel KEA-prezidanto, pro sia nuna UEA-prezidenteco. Kiel lian posteulon oni unuanime elektis d-ron Puramo Chong, kun vicprezidantoj LEE Nakkee kaj MA Young-tae. Puramo Chong, orientmedicina kuracisto,

esperantistiĝis en 1970, pli ol dek jarojn ĉefredaktoris por *La Espero el Koreio*, prezidas Internacian Naturkuracan Asocion, kaj estas ĝenerala sekretario de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM).

Paralelan forumon, pri "Religioj kaj la E-movado", malfermis Kyotaro Deguchi, invitita por prelegi pri la japana religia movado Oomoto, kiu havas rilaton pli ol 70-jaran kun Esperanto kaj modele utiligas ĝin por disvastigi sian ismon. BAK Giŭan parolis pri kristanismo, kaj CHOE Tae-sok pri ŭonbulismo.

Altiris la atenton prelego de NISIO Tutomu, kiu reprezentis Esperantogrupon eldonontan komunan lernolibron pri la historio de japanaj-koreaj rilatoj (vd. apr. '95, p. 67).

La dua forumo, kvazaŭ antaŭaranĝo de la Unua Azia Kongreso, estis dediĉita al la temo "E-movado kaj perspektivo en Azio". Oni multe parolis pri la rolo de KAEM kaj petis ĝin fari detalan agadplanon por la azia movado.

CHOE Tae-sok (Koreio)

Religiestro por Esperanto

Jam de la 80-aj jaroj la korea religia organizo ŭonbulismo subtenadas la E-movadon.

En ĝiaj temploj, trejnejoj kaj meditejoj multfoje okazis E-kongresoj, seminarioj, kursoj kaj renkontiĝoj. Jam eldoniĝis en E-o ĝia baza skribo *Chŏngjŏn* (1988), kaj eldono de ĝia sankta skribo estas preparata. Pasintjare LEE Kwangjeong, lernanto de E-o, elektiĝis kiel la plej alta gvidanto (ĉefmajstro) de ŭonbulismo. Tio estas granda ŝanco por disvastigi Esperanton kadre de religio kun milionoj da kredantoj kaj multnombraj edukejoj.

La 22-an de septembro ĉefmajstro Lee prelegis en la Novjorka sidejo de UN, invitive de Monda Konferenco pri Religio kaj Paco, pri "Interreligia kunlaboro por la evoluigo de monda komunumo". Listigante urgajn taskojn farendajn kunlabore kun UN, li aparte emfazis la neceson alpreni komunan mondlingvon. Al demandoj de ĵurnalistoj li respondis ke Esperanto ja valoras esti komuna lingvo.

chts



Esperanto inter rifuĝintoj

Eĉ en la grandaj rifuĝejoj de Afriko Esperanto ekzistas. Ekzemple en Kikuma (Kenjo), kie dekmiloj atendas ĉu reiron hejmen, ĉu elmigron al nova lando, ĉu nur la morgaŭon. En Kikuma aktivas manpleno da esperantistoj, venintaj el Zairio kaj Burundio. Jen raporto de burundiano NZANIYE Jessé Le-Prince.

Esperanto-instruado ne estas oficiale permesita en Kenjo, kaj jam unu klubo en Mombasa pro tio devis ĉesi. Por peti leĝan eblon instrui E-on, mi skribis leteron kaj poste vizitis la distriktan komisiiton, kiu reprezentas la prezidenton de Kenjo. Restante neŭtrala, li tamen promesis pritraktigi la aferon kaj iam doni respondon.

La sudana komunumo

Por sudanaj rifuĝintoj en Kakuma okazis de januaro ĝis marto 1995 E-kurso en sabat-adventista preĝejo. Ĝi tamen ĉesis post alveno de aliaj dekoj da lernantoj el la etiopia komunumo, pro politika malinterkonsento. Tial, kvankam la Internacia Helpokomitato apogis la junan grupon donante skribtabulon, la kvarmonata kurso ne donis multajn fruktojn. Kunordigantoj tie estis John Jalap Dieu, instruisto de elementa lernejo, kaj Juanis Luoi Gai, studento.

La zairia komunumo

Esperanto ekis inter zairianoj en Kakuma eĉ antaŭ ol mi alvenis al la kampadejo, dank' al Patriko (pordisto ĉe hospitalo), Dieudonné (kiu instruas la anglan lingvon al plenkreskuloj) kaj Lamberto. De decembro 1994 ĝis aprilo 1995 ni kune organizis E-kurson, unu klason por komencantoj kaj unu por progresantoj. Zairianoj klopodis trovi por la instruisto salajron aŭ poŝmonon el la lokaj helporganizaĵoj, sed vane. La neregistara organizaĵo apogas aliajn finance, sed ne E-on.

La etiopia komunumo

En aprilo 1995 komenciĝis kurso en ŝtata lernejo forlasita, dank' al bonaj rilatoj inter John Jalap Dieu kaj la lernejestro. La plimulto de la lernantoj estis verkemuloj, kiuj aliĝis al kampadeja kurso pri ĵurnalismo. Tiu agema grupo, kiun mi instruis Cseh-metode, sukcesis paroli E-on post 60

tagoj. Poste fondiĝis la klubo Universala Ĝardeno Eduka por Kakuma, kies prezidanto, TILAHUN E. Michael, sukcese aranĝis kurson por novuloj. Tiun kurson tamen malhelpadis religia problemo: iuj opiniis ke E-o estas malbona por la religio, ĉar se la tuta mondo adoptos ĝin kiel duan lingvon, naskiĝos Antikristo. Por forigi tiajn pensojn, mi verkis anglalingvan broŝuron (aperonton) kaj organizis seminarieton, por klarigi la veran rolon de Esperanto. Nun ĉiuj ŝajnas konsenti, sed por plu lerni la lingvon necesas speciala vekado — ĉu fare de eksterlandaj gastoj, ĉu per subvencioj.

Listo de homoj diverskomunumaj kiuj daŭre interesiĝas pri Esperanto estas havebla ĉe mi. (Multaj ŝatas doni nur unu nomon aŭ pseŭdonomon pro politika kialo.) Esperantaj legaĵoj estas bonvenaj.

NZANIYE Jessé Le-Prince
Kakuma Refugee Camp
Box 43801
Nairobi, Kenjo

Red.: Nzaniye, partopreninto de la Varsovia UK (1987), aŭtoris la teatraĵon La knabino estas mia (2 vol., 5,10 resp. 6,90 gld. ĉe la Libroservo de UEA).

Por konvinka bildo Triamonde

Tridek jaroj da spertoj ebligas al madagaskara aktivulo tiri konkludojn pri la disvastigado de Esperanto en la Tria Mondo.

Unu el la ĉefaj handikapoj estas la malriĉeco de la homoj. Tiu fakto neniel permesas al la dezirantoj lerni Esperanton per pagitaj kursmaterialoj. Kurskosto ne estas petebla. Alia demando estas tiu kiun la kursanoj aŭtomate starigas al si mem kaj al ni: Al kio Esperanto utilos post la lernado? Ĝenerale ili komparas la tujajn avantaĝojn de la franca kaj la angla, aŭ iu alia nacia lingvo, kvankam tiuj lingvoj estas malfacile lerneblaj por ili (minimume sepjara lernado kun nekontentiga rezulto).

En Madagaskaro la fremdlingvaj kulturaj centroj kaj institutoj (franca, usona, angla, germana, itala) kaj ambasadejoj (ĉina, japana, indonezia, hispana, rusa k.a.) ofertas al la plej bonaj kursanoj okazojn partopreni per

stipendioj staĝojn kaj eksterlandajn renkontiĝojn, ebligante al ili praktiki kaj vivi la lingvojn. Tio mankas al Esperanto-lernado! Mi konscias ke Esperantio ne povas disponigi tiajn rimedojn kiajn Britio, Francio, Germanio ktp... Tamen, se ni unuigas niajn fortojn, ni povas almenaŭ doni minimuman konvinkan bildon pri la internacieco de Esperanto: unu el la plej bonaj Esperanto-kursanoj povu partopreni Universalan Kongreson, staĝon en Greziljono aŭ La Chaux-de-Fonds, klubvivon alilande, por senti profunde en la spirito kaj la koro ke per Esperanto la tiel vasta mondo estas malgranda kaj ĉefe hejma.

Mi mem estas fidela esperantisto de 34 jaroj kaj ŝparas nek tempon, nek forton, nek sanon por Esperanto, ĉar

mi konkrete konstatis ties valorojn kaj utilon per miaj eksterlandaj vojaĝoj en 1962, 1963 kaj 1978, je miaj propraj kostoj.

Ne nur malagasaj esperantistoj iru alilanden, sed ankaŭ alilandaj esperantistoj venu al Malagasio! Bona okazo por tio estos la Unua E-kongreso de la Hinda Oceano kaj Orient-Afriko landoj (23-30 aŭgusto, Antananarivo).

Mi sugestas ke konsciaj esperantistoj kaj grupoj kuniĝu kaj kolektu gutojn da malavaraj kaj bonvolaj helpoj, sin pretigu akcepti malagasajn esperantistojn, por ke ili vivu la veran internacian interkompreniĝon. Rehejmiĝinte ili donos al aliaj la plej bonajn konvinkajn impresojn.

Ĉu vi pretas agi? Kontakto: Universala Kultura Servo (Logement Nr. 387, Cité Analamahitsy, MG-101 Antananarivo, Malagasio); aŭ s-ron Hans Bakker (Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando).

Eugène Raveloson (Madagaskaro)

Malferma jubileeto

La tria Malferma Tago de la Centra Oficejo, la 18-an de novembro, koincidis kun la 40-a datreveno de ties translokiĝo el Britio en Roterdamon.

Post kiam en 1955 montriĝis ke ne eblas trovi konvenan sidejon por UEA en Londono anstataŭ tiu en la izolita vilaĝo Heronsgate, la Estraro decidis malfermi novan oficejon en Roterdamo aŭ Hago kaj ekfunkciigi ĝin antaŭ la 1-a de februaro 1956. La nova administra sekretariino, Marianne Vermaas, tre rapide trovis konvenan ejon lupreneblan en Roterdamo (Eendrachtsweg 7), tiel ke la nova oficejo povis eklabori jam la 15-an de novembro 1955.

Jen la evento kiun rememoris niaj pli ol 100 gastoj dum la Malferma Tago, la 18-an de novembro — tamen ne plu en la iama lokalo, ĉar UEA pluan fojon translokiĝis, en 1961, kiam ĝi aĉetis la nunan domon en Nieuwe Binnenweg.

Post la sukceso de la unuaj du Malfermaj Tagoj — en novembro 1994 kaj aprilo 1995 — ni invitis esperantistojn el Nederlando kaj pluraj proksimaj landoj: alvenis gastoj ankaŭ el Belgio, Germanio kaj Francio. Brition reprezentis la honora gasto William Auld — en 1955, novbakita redaktoro de *Esperanto*, li propramane enpakis la oficejon en Heronsgate. Lian rakonton pri tiu epoko kompletigis Joaquim Calado, la nuna ĉefdelegito de UEA en Nederlando, kiu siavice elpakis la oficejan ilaron en Roterdamo.

Ilia publiko superplenigis la salomon Zamenhof, kie okazis ankaŭ tuttaga montrado de vidbendoj. Krome oni povis sekvi ĉiĉeronadon tra la oficeja domo, de Biblioteko Hodler ĝis la kafoĉambro — kie la tutan tagon fluis kafo, teo kaj babilo. Eblis konatiĝi kun la oficistoj kaj iliaj taskoj, ĉar ili



La "Administra Oficejo", kiel ĝi prezentiĝis al la e-istaro sur la kovrilo de nia revuo en januaro 1956.

ĉiuj ĉeestis, farante (aŭ provante fari) sian ordinaran laboron.

La plej granda homalfluo, vera tumulto, celis la Libroservon, kiu en sola tago enkasigis 6200 guldenojn — sumon similan al unutaga enspezo de amase vizitata dumkongresa libro-servo.

Montriĝis ke multaj alvenintoj, eĉ nederlandanoj, unufoje vizitas "la domon de UEA". Tamen, ne necesas heziti pri tiaj vizitoj: la Centra Oficejo estas je via dispono ne nur dum la sekva Malferma Tago, en aprilo 1996, sed fakte kiam ajn — precipe se vi antaŭanoncas vian venon. ★

Toleremo en tri lingvoj

La 27-a Kataluna E-kongreso (12-15 okt., Mataró; ĉ. 110 partoprenantoj) donis ekzemplon de lerta interplektado de nacilingvaj kaj Esperantaj eroj.

La kongreso disvolviĝis ĉirkaŭ la temo "De kompreniĝo al toleremo". Prelegoj hispanlingvaj, katalunaj kaj Esperantaj kunmetiĝis laŭdinde. Abel Montagut parolis pri toleremo ĝenerale; pastroj Manuel Casanoves kaj Gerrit Berveling pri religia toleremo, respektive maltoleremo; Jordi Tolrà, estro de programo pri reintegrado de bosniaj rifuĝintoj, kaj Felip Artero, kiu civilservas por la projekto, pri etnaj konfliktoj (precipe, sed ne ekskluzive, rilate Bosnion); Jordi Petit, sekretario de la internacia geja asocio ILGA, pri la geja movado; Juan de Dios Ramirez, prezidanto de la cigana Union Romani kaj eŭro-parlamentano, pri ciganoj; prof. Gentil Puig pri la juda komunumo en Katalunio, kaj Inongo Ví Makomé pri centrafrika enmigrado en Eŭropon kaj Katalunio.

Ĝuste la regiono de la kongresurbo famas pro granda nombro da afrikaj enmigrintoj — kaj, maltamen, pro bona kunvivado. Tiurilata programero estis instruado de magrebaj dancoj. La kulturala programon kompletigis koncertoj (Ĵak Le Puil, plurlingva pac-koruso, kaj sefardaj kantoj); prelegoj de la poetoj Gerrit Berveling, Miguel Fernández kaj Abel Montagut, kaj prezento — fare de Fernández — de la aperonta poemaro *Havenoj* de Mauro Nervi.

Laŭ statistiko de la organizintoj, ne malpli ol 10 ĵurnaloj, 4 semajnaj gazetoj, 12 radioj, 4 televido kaj la hispana inform-agentejo raportis pri la evento. Elstaras la longaj artikoloj en la vaste legataj ĵurnaloj *El Periódico* kaj *El Mundo*; du-minuta informo en sabat-vesperaj novaĵoj de la kataluna televido; kaj kvaronhora intervjuo kun kvar aktivuloj en la tut-ŝtata Onda Cero Radio.

Gerrit Berveling (Nederlando) kaj Hektor Alos (Katalunio)

Unu el la plej interesaj! Abonu NUN al

EVENTOJ

Petu senpagan provnumeron:
pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario.

Laste aperis



A handy English/Esperanto ABC of terms used in Great Britain by trade unionists and others in the labour movement.

Grimsby: SATEB, 1995. 8p. 21cm. Ducento da esprimoj por sindikataj aktivuloj. 2,40 gld.

Alaŭdo, La. Kantoj en Esperanto. Turku: E-Societo Turku, 1995. 68p. 21cm. 70 kantoj finnaj kaj aliaj, parte kun muziknotoj. 9,90 gld.

Antologio de amoro. Div. aŭtoroj. Rotterdamo (?): Eroto, 1995 (3-a reviziita eld.). 95p. 21cm. Erotikaj rakontoj kaj poemoj, parte tradukitaj el la japana. 12,90 gld.

Babilaĵoj de esperantisto. Lavango n-ro 1. Aleksandro S. Melnikov (1951). Rostov-na-Donu: la aŭtoro, 1995. 50p. 21cm. "Spertoj, analizoj, konkludoj, sugestoj kaj supozoj", kiuj "absolute ne pretendas esti revelaciaj, sekvindaj kaj admirataj". 9,00 gld.

Ĉapo de la sterko-vermo, La. Georgo Kamaĉo (1966). Thaumiers: La kromkancer-kliniko, 1995. 20p. ISSN 0398-5822. 30cm. Esperantigo de hispanlingva teksto verkita sub efiko de halucina fungo. 9,90 gld.

Esperantistische Weltbilder. Wojciech Usakiewicz. El la pola trad. Gary Mickle. Berlin: Maldekstra Forumo, 1995. 18p. 21cm. Pri la mondkonceptoj de Zamenhof, Lanti kaj Szathmári. 1,80 gld.

Esperanto — een kritische kijk op de Internationale Taal. Alberto Fernández. Brussel: Masereelfonds, 1995. 88p. ISBN 90-74907-03-2. 21cm. Nederlandlingva. Populara prezento de la historio, movado, strukturo, literaturo kaj instruado de Esperanto. 21,00 gld.

Esperanto ou Babel: faut choisir. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1995. 27p. ISBN 2-906134-29-5. 21cm. Informoj pri la monda lingvoproblemo kaj Esperanto. 3,90 gld.

Esperanto-rörelsen i Göteborg 1892-1992. Christer Lönnemark (red.). Svedlingva. Göteborg: Esperanto-Alliansen i Göteborg, 1994. 121p. ISBN 91-630-3263-5. 21cm. Historio de loka movado. 27,00 gld.

Esperantska gramatika. Violin Oljanov (1919). Sofija: Pres-Esperanto, 1992. 111p. 20cm. Bulgarlingva gramatiko de akademi-ano. 6,00 gld.

Infanoj en la Transmondo. Francisco Cândido Xavier, Caio Ramacciotti. El la portugala trad. Nelson Pereira de Souza. Rio de Janeiro: SES Lorenz, 1995. 78p. 18cm. Ilus. Mesaĝo diktita de la spirito Marko, forpasinta kiel 12-jarulo. 21,30 gld.

Invento de l' jarcento. Dramoj kaj komedioj. Julian Modest (ps.). Sofio: Bulgara E-Asocio, 1993. 79p. 20cm. Dramoj: *Pluv-vespero*, *Enŝteliĝi en la koron*, *Stela melodio*. Komedioj: *Invento de l' jarcento*, *Eŭropa firmao*. 6,00 gld.

Je via sano! Elzaco kaj ties vinoj! Philippe Gocker. Wintzenheim-Colmar: TAKE, 1995. 42p. 21cm. Ilustraĵoj de Jean-Pierre Cancel. Trilingva: E-franca-germana. Pri la vitoj kaj vinoj de Elzaco. 12,30 gld.

Lirikaj perloj de Al-Andalus. Antonio Marco Botella (1921). Zaragoza: Fundación Esperanto, 1995. 327p. ISBN 84-605-3444-8. 21cm. Ilus. Monografio pri la muzulmana Hispanio (711-1492), precipe ties literaturo. Kun multaj poemtradukoj. 28,80 gld.

Logo. Allogaj bildhistorioj. Maria Sobral. Desegnis Elison. São Paulo: Zamenhof Editores, 1995. 15p. 28cm. Kvar bildrakontoj. 9,90 gld.



Tre maloftas en Esperanto monografioj de tiaj nivelo, amplekso kaj bela aspekto kiel *Lirikaj perloj de Al-Andalus*.

Notoj pri kelkaj matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Plena Ilustrita Vortaro. Olav Reiersøl (1908). Nøtterøy: la aŭtoro, 1995. 12p. 30cm. 4,50 gld.

Nova Realismo, La. La konsekvenco de la Nova Pensado. Bruno Vogelmann (1909). El la germana trad. la aŭtoro. Antverpeno: FEL, 1995 (2-a eld.). 185p. ISBN 90-71201-29-0. 20cm. Argumentoj por mondkoncepto bazita sur respekto al la vivo kaj al la homa racio. 19,80 gld.

Per flugiloj de la kanto. Liljana Panajotova. El la bulgara trad. Marin Bacev, Canko Ignev. Sofio: Muzika E-Ligo, 1995. 97+14p. 21cm. Portreto de la komponisto Dimitar Terziev, estro de Internacia Esperanto-Ĥoro. 15,00 gld.

Perforto kontraŭ infanoj. Ulrich Matthias (1966). Neckarhausen: la aŭtoro, 1995. 19p. 21cm. Pri la historio, kaŭzoj kaj preventado de infan-mistakto. 3,30 gld.

Podręcznik do nauki języka międzynarodowego Esperanto. Pełny kurs ze słownikiem. Włodzimierz A. Brzeziński (1962). Gdynia: Lingwa, 1995. 101p. ISBN 83-900341-1-5. 21cm. Bazaj lernolibro kaj vortaro por pollingvanoj. 18,00 gld.

Ruĝa hirundo, La. Rik de Roover. Antwerpen: La Verda Stelo, 1995. 63p. 21cm. Dek rakontoj. 11,10 gld.

Sistemo N.B.N. (Nova Biologia Nomenklatur), La. W.M.A. De Smet (1932). Kalmt-hout: Asocio por la Enkonduko de NBN, 1991-95. 94+101+92+71+70+67+75p. 30cm. Klarigo de alternativa sistemo por sciencaj nomoj vivantaĵojn. En apartaj kajeroj: 1000 NBN-nomoj kaj 100 decidoj de NBN-komisiono. 96,00 gld.

Voyage au fil des mots. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1995. 155p. ISBN 2-906134-26-0. 21cm. Pli ol 2 000 falsaj amikoj kaj aliaj vortoj ial malfacilaj por franglingvanoj. 29,40 gld.

Was ist Esperanto? Wozu Esperanto? Berlin: Maldekstra Forumo, 1995. 10p. 21cm. Germanlingva. Baza informilo. 1,20 gld.

DIVERSAĴOJ

Partituro: Povas plori mi ne plu. David Gates (1961). La aŭtoro, 1994. 7p. 28cm. Ringe bind. Partituro de kanto "al la civitanoj de Bosnio kaj Hercegovino", gajninta en Belartaj Konkursoj 1995. 19,20 gld.

Vidbendo: Adelajdo kongresurbo. Rotterdam/Hackney: UEA/Aŭstralia E-Asocio, 1995. PAL aŭ NTSC. 10-minuta. 42,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Novaĵoj el Litovio kaj Litovia Esperantujo.

Beletro tradukita kaj originala.


Historio kaj aktuala.

Organo de Litova E-Asocio.


Aperas 6-foje jare.

Abonebla ĉe UEA: 20 gld.

LITOVA STELO
LIETUVOS ZVAIGZDĖ



Kie estas nia kvalito?



La 10-jara Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF, vd. dec., p. 206) progresas rapide, dum multaj Esperanto-organizoj perdas membrojn aŭ eĉ malaperas senbrue. Kial tiu fenomeno?

Mi estas juna esperantisto, sed mi tutenergie aktivas en la movado jam de 15 jaroj. La sperto montris al mi: nuntempe ne eblas sukcesi nur per kvanto, necesas utileco kaj kvalito por ke la socio nin atentu. Komercesto aŭ sciencisto postulas ne kvanton, sed bonan kvaliton. Se unu sukcesas en komerco aŭ scienco pere de Esperanto, kelkaj ekscias pri ĝia utilo; se kelkaj sukcesas, multaj ekkredas pri ĝia valoro. Kvalito pli facile kondukos al kvanto. Tial la praktiko de IKEF

kaj similaj fakgrupoj havas pli grandan signifon por nia movado ol amatoraj E-kluboj kaj -societoj.

Bedaŭrinde multaj aŭtoritatuloj en Esperantujo ankoraŭ ne senpartie taksas la praktikadon de Esperanto en komerco. Fakte, komerco — kiel Esperanto — estas demokratia afero, kompare kun multaj en la mondo. Ni devas prioritati ĝin kaj aliajn praktikajn kampojn de nia agado, ĉar la agadkampoj sen socia utileco estas ŝatokupaj aferoj.

Mi devas menci ke, malgraŭ sia pozitiva influo al la movado, IKEF mem akceptas influon de hobia, akademista stilo — tia en kies abismon ŝajne enfalis UEA. Tia stilo esence kontraŭstaras la ideojn de Zamenhof kaj de la fondinto de UEA, Hodler. Por nia vera kvalito ni ne tre bezonas lingvoprofesoron, sed ja lingvoutiliganton; ni ne tre bezonas teoriantan simpozion, sed ja festivalon kaj foiron.

WANG Tianyi (Ĉinio)

Ŝanco kaj alternativo

La plej logika kaj racia estonteco de nia internacia lingvo estas ĝia ĝeneraliĝo. Tia evoluo sendube verŝajnas. Temas ja pri la plej esprimkapabla lingvo kiun la homaro sukcesis krei. Ĝiaj parolantoj klopodas kulturi ankaŭ la neŭtralecon de Esperanto, malhelpo al partia antagonismo. La fakto ke la kreantoj de la lingvo penis elekti radikojn komunajn en multaj lingvoj, konfirmas la interkomunikeman kaj interamikigeman tendencojn.

Do, kiaj estas la motivoj kiuj ĝis nun malhelpis la ĝeneralan akcepton de io tiel racie utila kaj rekomendinda? Sendube la politika kaj ekonomia potenco de la nun superregantaj anglaparolantaj landoj. Krome la normala inerteeco kiu ĉiam kutimas kontraŭstari ŝanĝojn kaj eĉ kontraŭstaris ĝis nun la akcepton de la metra sistemo en iuj nacioj.

La superrego de la angla lingvo ŝanceliĝos kun ĝia ekonomia bazo. Tiel kiel la sovetunia hegemonio malaperis je sufiĉa rapideco, ankaŭ la usona ne daŭros eterne, malgraŭ siaj kvalitoj kaj avantaĝoj. En la horizonto de la estonteco jam aperas Ĉinio kaj Japanio. La kulturo de tiuj landoj estas multe pli antikva ol tiu de la anglaparolantaj. Do malverŝajnas ke ili tendencos lingve angliĝi. Sed la lingvoj de tiuj aziaj landoj ne estas facile lerneblaj. La logika konsekvenco estos la ĝenerala akcepto de la lingvo plej facila kaj perfekta de la mondo.

Sed se tio ne okazus en proksima estonteco, rezultus alia sekvo: nia belega lingvo restus privilegio de klera, inteligenta elito, kiu fieras kultivi homan fratecon kaj pacon.

Werner Schad (Argentino)

Komerca pensado



La kontraŭsektisma instigo de A. Gofen (okt. '94, p. 168) al "inĝeniera pensado" rilate al la konstruado de reala bezono de komuna lingvo kiu respondu al sociaj necesoj,

ne al filozofiaj revoj, ŝajnas al mi merita je granda atento de la specifaj fakoj kiuj jam strebas al la uzado de lingvo internacia por faciligi la reciprokajn rilatojn en scienco, tekniko, komerco kaj aliaj kampoj.

Pri komerco, ekzemple, oni jam faras antaŭpaŝojn, laŭ informoj de lokaj revuoj (kiel *La Eta Gazeto*, Triesto, Italio), por interrilatigi komercistojn de apudaj diversnaciaj regionoj, kun malsamaj spertoj kaj leĝoj pri la interŝanĝo de produktoj. Esperanto Komerca Agado (EKA) povus havi kelkajn atutojn tiucele. Sed kiel tio eblus sen forta tutmovada apogo?

UEA povus trafi preskaŭ historian momenton en la kunordigado de translima komerco, se ĝi propagandus grandskale la uzon de E-o kiel komerca lingvo. La projekto EKA proponas samtempan organizadon, en apudaj regionoj, de rapidaj praktikaj E-kursoj kaj de interŝanĝoj de varoj, katalogoj, informiloj, por kontaktigi malgrandajn aŭ familiajn entreprenojn.

UEA centre rolus en tiu projekto:

1) konigante ĝin pere de siaj revuoj;
2) favorante la aranĝon en siaj centroj per mallongaj intensivaj kursoj por komercistoj;

3) listigante la nomojn de esperantistoj/interpretistoj de orient-eŭropaj nacioj, pretaj servi jen kiel kursgvidantoj, jen kiel interpretistoj.

Samtempe UEA (rekte aŭ pere de specifaj fakoj) povus kontakti, precipe en malgrandaj urboj, la komercajn ĉambrojn aŭ aliajn asociojn de mezaj kaj malgrandaj entreprenoj per granda informkampanjo pri la novaj perspektivoj donotaj de Esperanto. Tio tre helpus familiajn kaj malgrandajn entreprenojn kiuj ne havas ekonomian forton sed serĉas novajn vojojn.

La projekto jam startis en etaj dimensioj, sed mankas al ĝi la subteno de granda organizo. Kial ne UEA?

Paola Gozzi Gorini (Italio)

Mazi superis ĉian optimismon

Pri la instru-kampa sukceso de la jaro 1995, la televida E-kurso Mazi en Gondolando, ni parolis kun ties reĝisoro, Roman Dobrzyński.

Kiel klarigi ke televida kurso pri la angla lingvo farita de la brita dissenda kompanio BBC — kies simpatio por Esperanto ne ŝajnas certa — estis adaptita ĝuste en Pollando por instrui Esperanton?

Iam en 1990 Mila van der Horst-Kolińska, nome de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, komisiis al mi prepari vidbendan kurson de Esperanto utiligeblan de profesiaj televidstacioj. Post trijara klopodo mi retiriĝis el la projekto, konsiderante ĝin nerealegebla kadre de la Esperanto-movado: unue pro manko de profesia stabo, due pro manko de mono.

Kie vi tamen trovis la spurojn de Mazi?

En varsovia tenisejo. . . . Mi renkontis tie kolegon Piotr Friedrich, kiu aparte specialigas pri fremdlingvaj kursoj por televido. Li sugestis al mi *Mazi en Gondolando* kaj sufloris trakti pri ĝi kun la firmao Tommy, la reprezentanto de BBC en Pollando. *Mazi* entuziasmigis min, sed mi dubis ĉu BBC permesos esperantigi ĝin.

BBC konsentis. Kontraŭ kiu sumo?

Mi ne scias ekzakte; la licencpago estis enkalkulita en la ĝenerala produktokosto. Laŭ la tiamaj kalkuloj de Tommy por la E-versio de *Mazi* sufiĉis ĉ. 40 mil usonaj dolaroj — nekredeble malalta sumo. La originala versio certe kostis pli ol milionon da britaj pundoj. La rajto esperantigi *Mazi* ŝajnis al mi grandioza donaco por la movado. Mi tuj faris proponon kaj renkontis . . . kontraŭstaron, ĉar niaj mecenatoj ne volis kurson “por infanoj”, sed propran, “seriozan” produkton.

Do, kiel vi trovis la monon?

Ne mi ĝin trovis, sed IEI — fakte Mila van der Horst. Ŝi havis la genian ideon anonci la eblon antaŭpagi por *Mazi*. Samtempe IEI investis en la

provlecionon, kiu estis tre rapide farita. Mi montris ĝin dum la UK en Seulo en 1994. Kiam Japana Esperanto-Instituto antaŭpagis 200 ekzemplerojn, ni ekkredis ke la projekto estas savita, kvankam necesis 800 antaŭpagoj. Ĝis la kongreso en Tampere alvenis 1200, kio superis la plej optimismajn prognozojn.

Sukceso kutime havas multajn patrojn. Kiuj estas la gepatroj de Mazi?



Ĉu Andrzej Tomecki (dekstre) dublas nun la Reĝon aŭ Petron? Reĝisoro Roman Dobrzyński (maldekstre) scias: la Reĝon.

Unue mi menciis “la patrinon”, Mila, kiu “elfosis” la monon kaj prizorgis la komencan investon. “Patrojn” mi nomu almenaŭ du. Tomasz Wojciechowski, estro de la firmao Tommy, aranĝis la licenccon por esperantigi *Mazi* kaj poste riskis produkti ĝin. Fine mi mem sentas “patrecon” de *Mazi*, ĉefe kiel ĝia reĝisoro, sed ankaŭ kiel iniciatinto kaj adaptinto de la teksto.

La fina nomlisto tamen pli longas.

Jes, *Mazi* bele ekzemplas internacian e-istan kunlaboron. Stefan MacGill esperantigis perfekte fidele la anglan originalon. Lian tradukon mi reverkis tiel ke la dialogoj kongruu kun la lipmovoj de la rolantaj figuroj. Poste venis la grava fazoj de lingva kaj fonetika korektado, kie ĉefrolis Andrzej Pettyn. La korektadon kunordigis Mila, kiu konsultis diversajn lingvospertulojn, ekz. Katalin Smidélus.

Kial oni varbis Fraŭlinon Barlaston?

La ĉarma irlanddevena anglino aperas en la kurso kiel unusola viva persono, kies burleska personeco perfekte konvenas al la gondolanda menaĝeria kortego. Ŝia tasko estis montri bone videble la fonetikan modelon kaj samtempe “malplipoligi” la kurson.

Kial “malplipoligi”?

En la trihora filmo rolas pli ol 50 figuroj, al kiuj pruntas siajn voĉojn 9 profesiaj aktoroj — kaj ili ĉiuj estas poloj el Varsovio. E-istoj estas Jerzy Fornal (Korvaks), Kalina Pieńkiewicz (Reĝino), Andrzej Tomecki (Reĝo/Petro) kaj Kazimierz Mazur (Trombo).

Mi ne trovis e-istojn por la aliaj roloj. Sed la spertaj dublantoj Jerzy Jakubowski (*Mazi*), Krystyna Kozanecka (*Silvja*) kaj Mieczysław Moroński (*Karlo*) ludis sukcese siajn rolojn. Epizode aperis parolistoj de Pola Radio, Barbara Pietrzak kaj Andrzej Pettyn.

Kiel vi resumus la spertojn de Mazi?

Ĝenerale la esperantistoj eksentis perfekte la signifon de televida profesia kurso: preskaŭ 2000 ekzempleroj de sufiĉe multekosta espe-

rantaĵo estis venditaj dum apenaŭ duono de jaro! Temas pri tute senprecedenca verko en Esperanto, cetere realigita en nekredeble mallonga tempo. Tiu ĉi urĝeco speguliĝis ĉefe en la eraroj de la akompana libro. Baldaŭ pretos nova eldono.

Fine disigu nian lastan dubon: Ĉu vere ne estas malavantaĝo ke Mazi originale servas por instrui la anglan?

Ne, ĉar ĝia tuta mesaĝo bonege kongruas kun la ideoj de nia movado, kiel internacieco, toleremo, respekto de diverseco. La intrigo de la filmo enhavas bonon kaj malbonon, punon kaj premion, sed neniam perforton. Cetere, la licenco lasis la eblon ke, adaptante la tekston, mi plurfoje enmetu iujn esperantecajn akcentojn. Konvenas ke mi citu la lastajn vortojn: Ĝi estas fina kanto, disigas ni hodiaŭ, Do, vivu Esperanto! Ĝis revido, adiaŭ! ★

El sub la tapiŝo

La aŭtoro ofte atentigas redaktorojn de periodaĵoj pri erara lingvouzo, por ke en sekva numero ili faru ĝustigojn. Sed — li plendas — “anstataŭ danki min, la plej multaj kutime strutmaniere kaŝas sian kapon en paper-korbo kaj balaas la erarojn sub la tapiŝon, kie ili ŝime kaj putre akumuligas kaj stinkigas la tutan redakciejon.”

Kvankam leginto trovis lingvan eraron en la februara *Esperanto* (p. 29), li senkulpigis la redaktoron, kiu “rajtas fojfoje dormeti” (apr., p. 69). Nu, pro aliaj eraroj en la revuo, ŝajnas ke la redaktoro ne nur “dormetas”, sed dormegas kaj eĉ ronkadas. Kun lupeo ĉeokule kaj krajono enmane, mi malkovris jenajn erarojn en lastatempaj numeroj de *Esperanto*:

1. “... mi samopinias kun Gishron ke eternaj komencantoj **domaĝas** la reputacion de E-o.” (marto 1994, p. 51)

2. “Cenzuro de konsentaj agoj neniel **domaĝantaj** la eksteran mondon estas miskutimo firme rifuzenda ...” (marto 1994, p. 53)

3. “Ja tiun subtenon ĝuis nur nemultaj “elituloj”, devigitaj **kompensi** la privilegiojn per lojaleco al la reĝimo.” (marto 1995, p. 44)

4. “... alilandano restis ĉe konato mia ... tutan monaton, ne pensante

ke decus iom **kompensi** la manĝadon, se ne la loĝadon.” (marto 1995, p. 52)

En ĉiuj kvar frazoj temas pri intermiksado de vortoj kiuj estas “preskaŭ samsonaj, sed sence malsamaj” (PIV), t.e. de *paronimoj*.

La signifo de *domaĝi* estas proksimume: “ne voli elspezi, ne voli perdi, ne voli difekti”, iafoje tre proksima al *bedaŭri*, *indulgi*, *kompati*. Do, por ke 1. kaj 2. estu senchavaj, necesas skribi *damaĝi* aŭ unu el ĝiaj sinonimoj kiel *malutili*, *noci* aŭ *difekti*.

Kompensi signifas “fari kontraŭpezon aŭ ekvilibrigon de suferita malprofito aŭ peno”. Sed en 3. kaj 4. neniuj suferigis homon aŭ difektis aĵon, do ne ekzistas devigo kompensi. Tute male! Estis la subjektoj kiuj ricevis profitojn aŭ avantaĝojn, kaj pro tio ili devis doni aŭ fari ion bonan por montri dankemon kaj kontentecon. En tiu kazo la ĝusta verbo estas *rekompenci*.

5. “La utilo por la kursano daŭrigi resp. ne daŭrigi la kurson tute ne dependas de la fakto ĉu li jam pagis aŭ ne.” (dec. 1994, p. 203)

6. “La grupo i.a. rekomendis ke STEA, kunage kun Ĉina E-Ligo ... trejnu instruistojn, kaj okazigu ... en Pekino simpozion pri lernolibroj por infanoj kaj gejunuloj, resp. internacian E-semajnon infanan kaj junularan.” (dec. 1994, p. 204)

PIV donas jenan klarigon pri la signifo kaj uzo de *respektive*: “en respektiva maniero ... tia, ke ĝi respondas al unu sola el la priparolataj objektoj, dum aliaj paralele respondas al ĉiu el la ceteraj priparolataj objektoj.” En 5. kaj 6. mankas paralela rilato inter samnombraj aferoj. Sekve, en ili oni skribu “daŭrigi *aŭ* ne daŭrigi”, respektive “okazigu ... simpozion ... *kaj ankaŭ* internacian E-semajnon”.

Estos domaĝe se nia lingvo damaĝigos sur la paĝoj de *Esperanto*. Unu eraro estas peko, sed sama eraro dufoje en unu numero estas feko. Pro tio *Esperanto* meritas malpremion. Kio okazos estontece? Drasta rimedo estas aplikenda, ĉar la revuo riskas ricevi pluajn malpremiojn. La Verda Lingvo-papo anateme atendas.

Bernard Golden (Hungario)



• Italio: Invitoj Ŝekspirecaj

La Internacia Festivalo “Romeo kaj Julieta” (22-28 junio, Verono) arigos grandajn nomojn por prelegi: Renato Corsetti, Ivo Osibov, Claude Piron kaj John Wells parolos pri “Romeo kaj Julieta” el lingva, resp. jura, psikologia kaj socia vidpunkto. Aliĝu ĉe Esperanto-Grupo Verona, C.P.1616, IT-37100 Verona. (E. Ackermann)

En la sama landoparto, kiu inspiris Ŝekspiron, kunvenos la itala nacia kongreso (24-30 aŭg., Ferrara). Ĝi atendas eksterlandajn esperantistojn por sin liberigi de krokodilado. (R. Corsetti)



• Rumanio: Esperanta okupo por amatora dancgrupo

Ĉi tiu amatora dancgrupo en Oradea lernas Esperanton kaj deziras partopreni diverslandajn konkursojn kaj festivalojn de danco (popola kaj moderna), muziko kaj popolkantoj. Ili atendas leterojn pere de Esperanto-Asocio Oradea, C.P. 1-183, RO-3700 Oradea, Rumanio.



• Informado: Aŭtuna rikolto

En la belga magazino *Knack* (11 okt.) aperis 5-paĝa artikolo de L. Willems pri la multlingveco de la mondo kaj pri Esperanto. Malgraŭ evidenta simpatio, ĝi konkludas jene: "Mondlingvo de ne-okulfrapa minoritato, Esperanto estas tre taŭga veturilo. Eleganta kursaŭtobuso sen teknikaj fuŝoj. Kaj sen pasaĝeroj." (W. de Smet)

La literatura suplemento de la franca *Le Figaro* dediĉis la 5-an de okt. grandformatan paĝon al Esperanto, kun objektivaj tekstoj. (*Heroldo*)

La svisa ĵurnalo *Le Matin* (Bazelo) recenzis tutpaĝe (22 okt.) la Zamenhof-biografion *L'homme qui a défié Babel* ("La homo kiu defias Babelon") de Henri Masson kaj René Centassi (vd. okt., p. 175). La franca katolika magazino *Le Pèlerin* aperigis 4-paĝan artikolon (8 sept.) de Centassi mem. Masson estis intervjuita de la Pariza ĵurnalo *InfoMatin* kaj de la vjetnama sekcio de Radio France Internationale (la 15-an de sept.).

• Televido: Infanoj satelite

Parteto de la filmo pri Esperanto kaj infanoj, iniciatita de Antoine Vonnet (jun., p. 118) estis aĉetita de la internacia satelita kanalo TV 5 kaj montrita la 14-an de oktobro. La sama ero aperas en plurtema video-kasedo por instruistoj de la franca kiel fremda lingvo, kiun eldonis la firmao de Vonnet.

En Svislando "Rigardi anstataŭ aŭskulti", elsendo por surdaj homoj, prezentis la 28-an de okt. Esperanton en 15 minutoj, ekde Zamenhof ĝis Mazi. (*Eventoj*)

• Vidbendoj: Unua festivalo

En la unua Internacia Festivalo de Videofilmoj en Esperanto (20-23 okt., Brno, Ĉeĥio) pli ol 100 homoj spektis 7 filmojn: 5 el Ĉeĥio, 1 el Germanio kaj 1 el Japanio. La planita festivala konkurso ne okazis, ĉar nur 4 verkoj plenumis ĝiajn kondiĉojn. Tamen, tradicio estas lanĉita; jam eblas aliĝi al la dua IFVE ĉe Petro Chrdle: Anglická 878, CZ-25229 Dobříchovice.



• Gastronomio: Manĝi en "Esperanto"

En la centro de la itala havenurbo Bari de pluraj jaroj furoras inter gejunuloj la luksa trinkejo-kafejo Esperanto (Via Roberto da Bari, 146). La klientoj ricevas glumarkon kun la vorto "Esperanto", jam videblan sur miloj da aŭtoj. (S. Osborne, V. Polignano)

En Belfasto Kieran McMahon elektis la nomon "Esperanto" por sia restoracio pro ties multnacia kuirstilo, kaj ĉar "oni ligas ĝin kun internacieco kaj paco". Sur la foto: reklamtabulo de la restoracio (89 Dublin Road; ☎ +44/1232/248-708). (S. Osborne)

Samnoma restoracio en la usona Scottsdale (Arizono) ofertas altkvalitan italan manĝon. (*Esperanto USA*)

En Pekino sur la ŝildo de restoracio Zirui (strato Zengguanglu, Haidian-distrikto) okulfrapas la vorto "Esperanto" kaj verda stelo. Estro Kuang Hua, mem e-isto, planas funkciigi tie esperantistan salonon kun Esperanta menuo kaj E-servistinoj. (*El Popola Ĉinio*)

En la insulo Reunio (franca departemento en la Hinda Oceano) e-isto Hubert Fillaudeau gvidas la restoracion Ti'chouchou. (*Eventoj*)



Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp; fakso/tel +31-43-213.247; retroŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

Juna Esperanta paro (belga/finna) volas fervore labori ie ajn en la mondo, eventuale volontule. Skribu al: Lode Van de Velde kaj Maikki Kettunen, Pilkotunmäenkatu 7B29, FI-15240 Lahti, Finnlando.

La nova kaj sole uzinda adreso de la nova asocio Esperanto Nederland estas: p/a sekr. Ineke Emmelkamp, Arubastraat 53, NL-9715 RV Groningen, Nederlando; ☎ +31/50/577-59-54; ☎ 599-59-97.

Kun togolandaj gejunuloj ŝatus korrespondi novaj lernantoj de E-o: skribu al s-ino Viniita Cook, Nymboida School, Armidale RD., Nymboida N.S.W., Aŭstralio 2460.

Frisa Esperantista Rondo funebre sciigas la forpason de sia kara fidela samideanino Tine Brinkman. Nia Rondo danke memoras la senlacan sindonon dumvivan al la Esperantomovado. Tradukintino de *Afke's tiental* (*La dekopo de Afke*) en 1974.

La 14-a sesio de Internacia Somera E-Universitato okazos en Veliko Tarnovo (Bulgario) de la 13-a ĝis la 15-a de julio — informas E-Societo Lumo. Oni organizos dum la sesio ekskurson al historiaj objektoj, poste 5-tagan ripozon ĉe la Nigra Maro. Informoj: Jordanka Nikolova Ivanova, Pk. 6, bul. Bulgario 15, BG-5000 Veliko Tarnovo.

Kunveturant(in)o serĉata por rondvojaĝo tra orienta kaj suda Afriko, en majo. Anoncu vin ĉe s-ro Horst Gruner, German Embassy, P.O. Box 9541, Dar-es-Salaam, Tanzanio.

Irja Klemola (1898-1995)

Irja Klemola, dumviva membro, Honora Membro de UEA ekde 1980 kaj honora prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando, mortis la 13-an de novembro 1995 en Piikkiö, post 75 vivjaroj kiel esperantisto.

Klemola naskiĝis la 13-an de januaro 1898. Post studoj en Helsinko pri matematiko, fiziko, kemio kaj pedagogio, ŝi instruis de 1926 ĝis 1962 en la Knabina Lernejo de Turku, kaj fariĝis ties vicrektoro (1927-39), poste rektoro (1939-59). Ŝi aktivis en la skolta movado kaj estis sekretario de la Astronoma Societo de Turku (1936-56). En la 30-aj kaj 40-aj jaroj ŝi aperigis kvar finnlingvajn infanlibrojn.

Ŝi lernis Esperanton en kurso por studentoj en Helsinko (1920), sed precipe aktivis post sia emeritiĝo. Ŝi gvidis klubon por lernantinoj en Turku (1959-62), prezidis la E-societon de Turku (1962-66) kaj E-Asocion de Finnlando (1966-73), estis estrarano

de E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj. Membro de UEA ekde 1951, ŝi funkciis kiel delegito pri instruado de 1962 ĝis 1994, fine kiel plej aĝa membro de la Delegita Reto. Ŝi malavare mecenatis multajn movadajn fondaĵojn. Ŝi verkis lernolibron por finnoj, *Planlingvo Esperanto* (1980), kaj adaptis la Zagreban metodon al la finna (1989). Ŝia plej kara laborkampo estis informado: ŝi verkis broŝurojn, tradukis E-artikolojn por finnaj revuoj, interpretis okaze de vizitprelegoj.

Klemola partoprenis jam la 14-an UK-on en Helsinko (1922), kaj vicprezidis la LKK-on de la 59-a UK en la sama urbo (1969). Je 90-jara aĝo ŝi veturis trajne al la Roterdama UK (1988), sed pasintjare ŝia sanstato ne plu permesis al ŝi veni al la Tamperea UK, kie salono portis la nomon Irja Klemola. Tamen, por la esperantistoj de Finnlando ŝi restos — kiel ili ĉiam kutimis nomi ŝin — nur “Avinjo”.



Irja Klemola, gratulata de Grégoire Maertens en la Stokholma UK (1980), kiam ŝi fariĝis Honora Membro

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Claudio R.S. Spinelli. Italio: Carlo Bourlot. Japanio: HASEGUTI Sigeyuki.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA 1996

PATRONOJ (minimumo \$100): Japanio: Nobuo Sakurai.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: Ralph Harry. Brazilo: C. de Moraes Lemos. AMIKOJ (minimumo \$10): Aŭstralio: Tom Elliott.

PATRONOJ DE TEJO 1996

Argentino: Atilio Orellana Rojas. Aŭstralio: Alan John Bishop. Belgio: Grégoire Maertens; Alexandre Humet. Brazilo: Marija Pozder Almada. Britio: J.M. Ibbotson. Finnlando: Tiina Oittinen. Germanio: Martin Haase; Maria Vitalyos. Italio: Ada Fighiera-Sikorska.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Aŭstralio: Ralph Harry. Belgio: Eliza Kehlet; Elfriede Ernst; Grégoire Maertens; Marcel Delforge. Brazilo: Marija Pozder Almada. Britio: E.R. Waterworth; Harold Fillingham. Bulgario: Olga Gerasimova. Finnlando: Synnöve Myntinen; Unto Seppälä; Veikko Tikkanen. Francio: André Gilles. Germanio: Bruno Vogelmann; Doris Freess; Heinz Schindler; Julie Winter; Marieta Moschner. Japanio: Kyotaro Deguti; Kazuko Kikusima (Krizantemo); Nobuo Sakurai; Wilhelm Schmid; SIMADA Sunao; Nobuyuki Syozi; Keiko Syozi; Hiroshi Takahasi. Kanado: Petro Collinge. Neder-

lando: G.F. Makkink; Huibert Oortwijn; Oene Hoekstra; Sija van Wijngaarden; Wiebren Akkerman; W.A. Verloren van Themaat; Gerda H.M. Wulfers-Meddens. Norvegio: Tamiko Kaŭakami-Nielsen. Portugalio: João Alberto Frazão de Faria. Svedio: Tomas Jansson. Usono: Gigi Harabagiu; Lucille C. Harmon; William Keith Bledsoe; William R. Harmon. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich.

DONACOJ 1995 (gld.)

ĝis la 30-a de novembro

Fondaĵo Afriko: Germanio: H. Fillmann 109,45. Japanio: K. Syozi (por Kvara Afrika Kongr.) 300,00. Nederlando: A.J. ten Hagen 1117,50. Sumo ĉi-jara 13 780,53.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: M. Pozder Almada 368,00; J.G. de Lima 79,20. Sumo ĉi-jara 3821,62.

Fondaĵo Kanuto: Britio: P.A. Danning 50,00. Francio: M. Feneyrol (memore al T. Sekelj) 639,99. R. Gonin 61,00. Germanio: W. Bohr 29,08; W. Ehlers 14,54; H. Muhsal 12,00; H. Otto 46,98; J. Radam 14,54; G. Schmitt 14,54. Japanio (por aziaj e-istoj): M. Aihara 31,26; Y. Akada 156,30; M. Asami 31,26; H. Egawa 31,26; N. Hatayama 15,63; Y. Hori 31,26; H. Isobe 31,26; Y. Izumi 31,26; K. Katou 31,26; H. Kuriyama 31,26; S. Maeda 31,26; H. Matuda 93,78; S. Minaba 31,26; M. Nisimura 62,52; H. Obara 31,26; T. Ono 15,63; M. Osioka 85,96; M. Saiki 31,26; T. Saitou 62,52; K. Sanpei 31,26; R.

Sasaki 31,26; Y. Sasaki 62,52; S. Sato 62,52; R. Satou 31,26; W. Schmid 31,26; T. Sugano 31,26; G. Sutton 31,26; Z. Suzuoki 21,74; K. Syozi 156,30; M. Tahira 62,52; H. Takahasi 62,52; K. Takuma 31,26; H. Todoroki 31,26; K. Tooi 15,63; T. Ueda 31,26; K. Yano 31,26; S. Yosikawa 31,26; Nederlando: A. Beuzenberg 112,00; W.C. Keizer 25,00; R. Slot 250,00; L. Staghouver 28,00. Nepalo: M. R. Pathik 15,63. Diversaj malgrandaj 6,00. Sumo ĉi-jara 13 142,84.

Generala Kaso: Germanio: H.G. Strauss 111,75. Nederlando: Esperanto Nederland 150,00; P. de Blaeij 20,94; Y. Weidema 59,00. Norvegio: O. Tangerud 252,00. Diversaj malgrandaj 6,00. Sumo ĉi-jara 4785,70.

Fondaĵo Grabowski (en usonaj dolaroj): Nederlando: G.F. Makkink 318,06. Sumo ĉi-jara 991,66.

Konto Espero: Anonime 65,95. Britio: P.G. Hayward 12,25. Germanio: H.G. Strauss 111,75. Usono: E. Mustea 39,60. Sumo ĉi-jara 2192,36.

Propaganda Konto: Nederlando: F.H. Kat 50,00. Sumo ĉi-jara 1059,44.

Pasporta Servo: Britio: G. Buttinger 24,50. **Volontula Fondaĵo:** Nederlando: I. M. Demmendaal-Putter 30,00. Sumo ĉi-jara 2107,32.

Fondaĵo Wüster: Diversaj malgrandaj 9,80. Sumo ĉi-jara 79,68.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFIO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



*Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.)
estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa
suplemento. Kune ili priskribas
preskaŭ 250 universitatajn studojn.*

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. *Oferto:* Ambaŭ kune 23,50 gld.

IĜU ĴURNALISTO PER ESPERANTO!

Nun eblas, per la koresponda kurso de TEĴA por
trejnano de ĵurnalistoj, lerni metodojn kaj
praktikojn komferte hejme laŭ propra impeto!*



Plenigu kaj sendu la suban kuponon al:

*TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO,
ĉe d-ro Paul Gubbins,
3 Arden Court,
Mosley, Congleton,
Cheshire CW12 3JH,
Britio.

*Petu provekzempleron
de la faka revuo
INTERNACIA ĴURNALISTO*

*Bonvolu sendi al mi informojn pri la PERKORPORA KURSO de
TEĴA por TREJNADO DE ĴURNALISTOJ.*

Nomo _____
Adreso _____

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto
por ĉiu, kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KONTAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KONTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugalo	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Jen okazo por ekkolekti aŭ kompletigi la epokfaran Zamenhofan libroserion de ludovikito:

Rabato ekde 10 volumoj!

Parto unua – originalaro: Unuaj libroj por esperantistoj, p. 160, gld. 48; La inkunabloy de Esperanto, p. 283, gld. 39; Ni laboru kaj esperu!, p. 324, gld. 39; Antaŭen al la laboro!, p. 344, gld. 39; Tamen la afero progresas!, p. 414, gld. 39; Hebreo el la geto, p. 455, gld. 48; Kun gradaj paŝoj eksterlanden!, p. 427, gld. 39; La franca periodo de Esperanto, p. 229, gld. 48; Klopodis organizi, sed vane!, p. 446, gld. 39; La neforgeseblaj kongresoj, p. 303, gld. 48; Por kaj kontraŭ reformoj!, p. 383, gld. 39; Mortinta, sed senmorta!, p. 518, gld. 39; Konfliktoj inter esperantistoj, p. 451, gld. 48; Postrikolto de ludovikaĵoj, p. 307, gld. 48; Milito ĉion detruas!, p. 442, gld. 48.

Parto dua – tradukaĵoj: De Patronia al Ŝekspir', p. 455, gld. 48; De Mickiewicz al Goethe, p. 499, gld. 48; De Molière al Salom-Alejhem, p. 499, gld. 48; Fabeloj de Andersen, p. 822, gld. 165.

Parto tria – kromkajeroj: Senlegenda biografio de L. L. Zamenhof, p. 303, gld. 37,50; Korespondado ludovikologia, p. 273, gld. 37,50; Post la iel-tiela kompletigo, p. 296, gld. 37,50; Ludovikologiaj biografietoj, p. 335, gld. 37,50; Autografoj de Ludoviko, p. 408, gld. 48; Ludovikaj vortaroj el la 19a jarcento, p. 374, gld. 48; Leteroj de Sebert al Ludoviko, p. 280, gld. 48; Kial Ludoviko abdikis?, p. 278, gld. 48; Lingvaj respondoj de Ludoviko, p. 144, gld. 39; Ermitoj kuncelbris la majstron, p. 321, gld. 57.

Konciza originalaro de Zamenhof: Unua etapo de Esperanto, p. 948, gld. 120; Ĝis la homaranismo, p. 1040, gld. 120; Destino de Ludovika dinastio, p. 1002, gld. 120.

Ludovikologia dokumentaro. Aperis 14 volumoj: I Unuaj libroj, p. 487; II Komenctempaj lernolibroj 1, p. 365; III Komenctempaj lernolibroj 2, p. 451; IV Poŝaj lernolibroj, p. 617; V Diversaj vortaroj kaj lernolibroj, p. 533; VI Diverslingvaj broŝuroj, p. 499; VII Legolibroj I, p. 563; VIII Legolibroj II, p. 637; IX Adresaroj I, p. 367; XI Lingvo Internacia I, p. 463; XII Lingvo Internacia II, p. 493; XVI Spikumaĵoj I, p. 515; XVII Spikumaĵoj II, p. 537; XIX Ludoviko kaj la inkunabloy, p. 215. Ĉiu volumo en ĉi tiu sekcio kostas po 57 gld. escepte de XVII (72 gld.).

Ĉi tiu monumenta verkaro de Zamenhof aperis en limigita eldonkvanto kaj post kelkaj jaroj ĝi ne plu estos havebla. Fakte, jam kvar volumoj (nemenciitaj ĉi tie) elĉerpigis. **Kaptu la okazon!** Havigu al vi la plej zorge preparitan kaj la plej luksan libroserion en la historio de Esperanto. **Se vi mendas en unu fojo minimume 10 diversajn volumojn, ni ne fakturos al vi la sendokostojn, kaj vi tiel ŝparos 10%.** Se vi mendas la tutan kolekton de 46 volumoj, vi rajtas pagi la sumon (2 568 gld.) en kvin egalaj partoj ene de unu jaro,

Oferto valida ĝis la 31-a de januaro 1996.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!



eldonejo ludovikito



"Ĉu vi parolas tendare?" estis origine verkita por instrui Esperanton dum labortendaroj. Hodiaŭ, kiam tiuj aranĝoj malpli furoras, tamen necesis ...

...4-a eldono!

Ĉu vi parolas tendare?
Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Rotterdamo: TEJO, 1992 (4-a eld.).
21cm. 12,00 gld. Triona rabato ekde
3 ekz. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.



Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Internacia Rondo Esperantista PROSPERO

kies reklamo estis presita sur la dorsoflanko de Jarlibro 1995,
anoncas pri sia nova adreso:

Zinovi Kurolap, POB 5671, 114 86 Stockholm, SVEDIO

Tel.: +46-8-6145116 (11:00-19:00) Fax: +46-8-6145107 (24h) Mobil: +46-70-5375567 (9:00-22:00)

**LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!**



Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Rotterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj*
n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 76 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, foto-filmo, "Mallonge", ktp.

Jarabono: 28,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro
Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA
(55 guldenoj; aldonaj kostoj por aera sendo)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Via N. Sandre 15, IT-10078 Venaria Reale (TO), Italio
Redaktoro: Ada Fighiera-Sikorska